

Bulgara **ESPERANTISTO**



* * *	Por paco kaj kolektiva sekureco en Eŭropo	1
Asen Grigorov.	Mia patrolando	3
	Espero nia	3
Kunĉo Vălev.	La celebulo de nia jubileulo Asen Grigorov . .	4
Ĥristo Gorov.	Asen Grigorov 70-jara	5
Kr. Karucin.	Verkoj de Asen Grigorov	7
Boris Kălev, d-ro Stefan Kadiev.	Krăstju Janev Sivriev	8
Nenko Jonkov.	Novaj akiraĵoj de nia popolo	9
M. Conkovski, A. Nikolova, Ĥr. Kurumilev, Cv. Todorov.	Niaj jarkunvenoj	10
Cvĵatko Todorov.	La esperantistoj de Ŝumen traktas la Decembran Programon	13
Koljo Kondov.	Renovigita E-agado	13
Tatjana Radeva.	Celebro de la Bulgara-Soveta Kontrakto . .	14
G. Manev.	La esperantistoj de Drjanovo atingis bonajn rezultojn	14
Ljubomir Leviĉarov.	Restarigita E-sekcio	14
* * *	Subskribita protokolo inter la Komitato de Turismo kaj BEA	14
Nevenka Aleksieva.	Junulara E-Konferenco sur Vitoŝa	15
Ŝtraŝimir Spasov.	Metodika Konferenco en Smoljan	15
Fani Miĥajlova.	Nova lernanta E-societo	15
Veselin Nikolov.	Celebro de Kopernik	15
Plamen Văĉev.	Lernanto instruas Esperanton	16
Maria Diĉeva.	Renkontiĝo de junaj esperantistoj	16
Georgi Dimov.	Prelego pri Esperanto kaj la scienco	17
T. Radeva, B. Kavalĝiev.	Interesa iniciato de la esperantistoj en Ruse	17
Boris Kavalĝiev.	Necesa faro	18
N. Nikolov.	Aktivigo de E-agado en la internacia turismo .	18
Boris Kolker.	Multnombra renkontiĝo de sovetaĵ esperantistoj	19
N. Aleksiev.	La 18-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso . . .	19
* * *	La polaj aerlinioj LOT	20
Kobina.	Intereso al Esperanto en Rumanio	21
„BE“.	La jarkunveno de Hungara E-Asocio	22
Aleksandro Péter.	Malfermo de E-infanĝardeno	22
* * *	Intervjuo de Gisela Reller kun Konstantin Gusev . .	22
* * *	Esperanto en popularscienca libro	23
* * *	„Junularo“ — magazino de GDR	23
* * *	Demandoj kaj respondoj	24
R. Sikorski.	Pri la stilo de la tekstoj en Esperanto	24
Dimitr Denĉev.	La pentristo Simeon Ĉirpanliev	25
Jonko Korkinov.	Kiel naskiĝis la himno pri Kiril kaj Metodij	26
G. Korotkeviĉ.	Ekzistas ankaŭ tia lingvo	27
* * *	La popola pentristo Stojan Venev lernis Esperanton .	29
K. Munde.	Kiu estas heroo ?	30
* * *	Urso kaj maljunulino	30
Marin Băcev.	Krucvortenigmo	30
* * *	Tra la gazetaro	31
* * *	Deziras korespondi	32

Sur la kovrilpaĝo:

Nia jubileulo Asen Grigorov — momento el lia solena celebrado
(vidu paĝojn 3—8)

Abonkotizo: iara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — outlikigataj senpage.



POR PACO KAJ KOLEKTIVA SEKURECO EN EŬROPO

La analizo de la eŭropa realeco montras, ke la objektivaj interesoj de ĉiuj popoloj kaj ŝtatoj de la kontinento estas forte ligitaj kun la plifirmigo de paco kaj sekureco en Eŭropo. Ĉiam pli granda parto de la laborista klaso, de la juna generacio, de la intelektuloj de nia kontinento donas sian subtenon al la streboj de porpaca ekzistado anstataŭ subteni la politikon de sangoversaj militoj. En la menso de la ordinara eŭropa civitano fortiĝas pli kaj pli la ideo, ke nia kontinento povas kaj devas transformiĝi en bastionon de la paco kaj internacia sekureco. Tion klare esprimis ankaŭ Leonid Breĵnev — la ĝenerala sekretario de KPSU, kiu diris antaŭ la okcidentgermana televido: „Post kvaronjarcenta periodo de „malvarma milito“ realiĝas transiro al interrilatoj de paco, reciproka estimo kaj kunlaborado inter la ŝtatoj de Oriento kaj Okcidento. . . Ĝenerale oni povas diri nun, ke nia planedo evidente estas pli proksime al firma kaj daŭra paco ol kiam ajn ĝis nun. Sovetunio uzas sian tutan influon por fortikigi tiun bonefikan tendencon.“

En la decida batalo por la estonteco de Eŭropo krom la registaroj de nia kontinento grandan respondecon portas ankaŭ la eŭropa publika opinio. Ĝi devas influi al siaj registaroj, precipe al iuj registaroj en Okcidenta Eŭropo, partopreni kun ĉiuj aliaj registaroj de nia kontinento en tuteŭropa konferenco por kolektiva sekureco kaj pozitive, konstrue labori en ĝi. Gravan rolon en tiu direkto ludas la demokratiaj organizaĵoj kaj movadoj — politikaj, profesiaj, junulaj, kulturaj, sciencaj k. a.

La influo de la popolamasoj sur la internaciaj rilatoj en nia epoko eksterordinare plialtiĝas. Tio estas ligita kun la kreiĝo de socialismaj ŝtatoj, kun la kreskanta forto de la laborista klaso en la kapitalistaj landoj, kun la aktiviĝo de la internacia politiko de la landoj el tiel nomata „tria mondo“ kaj kun la ĉiam pli granda signifo de la problemoj de la ekstera politiko en la vivo de la popoloj. Oni plej bone sentas tion en nia kontinento, kiu en la proksima pasinteco estis fajrujo de la mondmilitoj, alportantaj al la eŭropaj popoloj neimageblajn suferojn.

Kompreneble, la burĝaj partioj kaj registaroj malhelpas al la aktivigo de la popolamasoj. Sed malgraŭ tio la publika opinio hodiaŭ havas multe pli vastajn eblecojn krei favoran politikan atmosferon por subteno de la ideo por paco, sekureco kaj kunlaborado en Eŭropo. Tiu publika opinio efike influas la poziciojn de apartaj politikaj agantoj, partioj kaj registaroj pri la eŭropaj problemoj kaj samtempe senmaskigas politikulojn kaj mediojn, kluj kontraŭstaras la pozitivajn tendencojn en Eŭropo.

Iuj politikaj partioj kaj registaroj, tute ne ŝatante la kunvokon de eŭropa konferenco por sekureco, iufoje per vortoj kvazaŭ konsentas kun tiu iniciato, sed fakte sabotas ĝin. Kiam ekzemple en Bruselo okazis Asembleo

de la Sociaj Fortoj por Sekureco kaj Kunlaborado (junio 1972), la medioj de NATO deklaris, ke ne estas necesa enmiksiĝo de la socia opinio en problemoj, pri kiuj la registaroj jam kreis diplomaciajn kontaktojn.

Ni, la esperantistoj, precipe tiuj el la socialistaj landoj kaj la progresemaj esperantistoj en la tuta mondo, kiuj subtenas la Mondpacan Esperantistan Movadon (MEM), havas tute pozitivan rilaton al la ideo pri tuteŭropa kunlaborado.

La bulgaraj esperantistoj estas reprezentataj en la Nacia Komitato por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaborado per la prezidanto de BEA. La plenkunsido de la Centra Komitato de BEA en oktobro 1972 aprobis specialan rezolucion pri la eŭropa sekureco.

Multfoje en nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“ aperis front-artikoloj kaj aliaj materialoj, kiuj klare esperimas nian komprenon kaj starpunkton.

Ni kredis kaj kredas, ke post la kelkjara streĉa laboro por realigo de la ideo pri eŭropa konferenco por sekureco, per la helpo de la publika opinio oni sukcesos influi la registarojn doni sian kontribuon por garantio de la sekureco de ĉiuj eŭropaj popoloj.

Kaj se en Eŭropo la paco estos stabiligita, la homaro povas esti certa, ke tio garantios la pacon sur la tuta terglobo. Kiel atestas la historio, el la teritorio de Eŭropo, nome el Germanio, dufoje ekflamis du mondmilitoj. Se Eŭropo diros al la milito „NE!“, — tio signifos, ke la paco triumfos kiel en Eŭropo, tiel ankaŭ en aliaj mondpartoj.

La esperantistaro kun ĝojo donas sian subtenon al tiu unika en la historio de nia kontinento amasa movado, kiu kreas favorajn kondiĉojn ankaŭ por la agado de la eŭropa kaj internacia esperantista movado.

Esperanto kaj milito estas antipodoj! Esperanto bezonas la pacan atmosferon tiel, kiel ĉiu vivanta estaĵo bezonas sunon kaj aeron.

Vivu kaj triumfu la sankta batalo por paco kaj kolektiva sekureco en Eŭropo!

EN „ESPERANTO“ DE UEA ARTIKOLO PRI BEA

En n-ro 808 de la monata organo de UEA „Esperanto“ (aprilo 1973) aperis artikoloj 13 kaj 14 de la artikolserio de Ivo Lapenna, prezidanto de UEA, sub la komuna titolo „Por pli efika informado“. Nome la unuan duonon de la artikolo 14, titolita „Ekzemploj de BEA kaj Wala-Wala (urbo en Usono), la aŭtoro dediĉas al la agado de Bulgara Esperantista Asocio.

Post iuj konstatoj pri BEA kompare kun aliaj landaj Esperanto-organizaĵoj la aŭtoro mencias pri la Rezolucio de la 38-a Kongreso de BEA: „La kongresa Rezolucio antaŭvidas aron de novaj iniciatoj kaj ampleksigon de la jam funkciaj laboroj en ĉiuj direktoj. Aparta atento estas dediĉita al fortikigo de la multnombraj lokaj grupoj, altiro de la elsendoj de Radio Sofio, pli efika partopreno en la internacia Esperanto-movado, pli sistema popularigo de la bulgaraj literaturo kaj kulturo ĝenerale, pli vasta konatigo de Bulgario kiel

REEŬOJ PRI LA 38-a KONGRESO DE BEA

* En la septembra n-ro de „Suplemento al PACO“, organo de Franca Laborista E-Asocio (la franca sekcio de MEM), aperis artikolo de nia amiko Gilbert, la ĉefredaktoro de revuo „Paco“, organo de MEM.

Per tre flataj vortoj Gilbert esprimas sian rilaton al la agado de la bulgara esperantistaro kaj ĝia 38-a Kongreso en Smoljan 1972, kiun li partoprenis.

* En „Pola Esperantisto“ n-ro 6-a (nov.-dec., 1972) la reprezentanto de Pola E-Asocio Jan Zawada skribas pri siaj impresoj de nia kongreso. Interalie li emfazas: „La plej grava trajto de la bulgara Esperanto-movado estas la fakto, ke ĝi intime kunlaboras kun la partiaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj, estas de ili ĉiuflanke apogata same finance, kiel ideologie kaj morale.“

lando de internacia turismo, ampleksigo de instruado de la lingvo en la lernejoj kaj alimaniere, intensigo de informado, ktp.“

POEZIO kaj BELETO

Versaĵoj de Asen Grigorov

MIA PATROLANDO

En mia bela patrolando
ĉielen altas la montaro,
kaj fluas la Danubo blanka,
kaj bruas onde Nigra Maro.

En mia bela patrolando
radias la ĉiellazuro,
triladas la alaŭda kanto,
de l' kampoj verdas la veluro.

En mia bela patrolando
autaŭenmarŝas mem la juno,
sonoras gaja rid' infana,
kaj forte lumas hela suno.

En mia bela patrolando
abundas riĉa florornamo,
kaj dolĉe sonas Esperanto,
kaj regas paco, regas amo.

En mia bela patrolando
en ĉiu urbo kaj vilaĝo —
de unu ĝis alia rando —
konstruas homoj kun kuraĝo.

En mia bela patrolando
kun hela penso, firma volo,
kun sia koro, sia sango
por paco luktas la popolo.

Pri vi bulgara kara lando,
mi verkas versojn kun fervoro;
vin ame gloras mia kanto,
por vi batadas mia koro.

ESPERO NIA

Espero nia
kore gardata,
ero de l' fajro
de Zamenhof,
celo radia
sento gefrata
vorto kaj faro
de l'homa pov'!

Cel' malproksima,
vojo senfina,
ĉu ni atingus
vin sen esper' ?
Ĉu sen fervoro,
sen plena koro
ĝojon ni trinkos
sur nia ter' ?

Ne ripetigu
plu Hiroŝima,
Lidice nova,
nova Song Mi!

Por la feliĉo
kun kor' sentima,
flam' Zamenhofa
batalu ni!

Vi donas forton
al la spirito,
pacon proponas
al tuta mond';
pelas la morton
de la milito,
vivon vi donas
por la estont'!

Ĉiun inspiru
alta sopiro,
nobla deziro,
firma fidel'!
Samideanoj,
kune ni iru
mano en mano
al nia cel'!

ALTA DISTINGO

La Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario honoris k-don ASEN GRIGOROV per ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — I-a grado lige kun lia 70-jara naskiĝtago, pro lia aktiva partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo kaj en la konstruado de la socialismo.

LA CELEBRO DE NIA JUBILEULO ASEN GRIGOROV

Pli ol duonjarcenton de sia vivo Asen Grigorov konscie dediĉis al aktiva, senlaca kaj tre fruktodona laboro por Esperanto. Sendube li estas unu el la plej grandaj figuroj de la bulgara Esperanto-movado, ĝuanta famon ankaŭ eksterlande.

Malfacile oni povas nombri ĉiujn meritojn de Grigorov al Esperanto-movado. Ĉiam iniciatema, sindona kaj alte kompetenta organiza aginto kun klara vido pri la celoj de la esperantistoj kaj la konkretaj vojoj por ties atingo, aginto el la centro, kiu neniam hontis plenumi ankaŭ plej „nigran“, ordinaran E-laboron en la malsuperaj vicoj de la Movado, inspirita agitanto de Esperanto per parolo kaj riĉa praktika aplikado, aŭtoro de multaj artikoloj kaj aliaj E-materialoj, aŭtoro de E-lernolibroj kaj vortaroj kaj virtuoza redaktoro de E-eldonaĵoj, elstara kaj ege fruktodona E-poeto kaj tradukanto, inspirinto de multaj E-generacioj — tia estas la konciza kelkvorta portreto de Asen Grigorov.

Tial la celebrazo de lia 70-jariĝo altiris kelkcentojn da esperantistoj. Ĝi okazis la 14-an de marto ĉ. j. en la Kulturdomo de la Komerc-laboristoj en Sofio. Kolektiĝis esperantistoj el ĉiuj medioj, el ĉiuj generacioj — de la blankharaj veteranoj, kunbatalantoj kaj amikoj de la celebrato ĝis adoleskuloj, kiuj ĵus jungis siajn fortojn por plugi la noblan Esperanto-kampon.

La solena celebrazo komenciĝis per riĉa belarta programo, kies literatura parto konsistis el verkoj nur de Asen Grigorov. Partoprenis ĝin: la geartistoj de Bulgara Esperanto-Teatro Belka Beleva, kiu recitis la versaĵojn „Mia kanto“ kaj „Estiĝu tag“, kaj Miĥail Cobanov — per „Balado pri rivero Ĉatkal“, plue: Vasja Petrova — „Arestejo“, Tanja Rajkova — „Vespero en Szeged“ kaj „Amo“, Kunĉo Vălev — „USSR en danĝero“ kaj „Paco en Vjetnamio“. En la muzikprogramo partoprenis: la operkantistino Maria Angelova — per „Mia bela Patrolando“ — teksto de Asen Grigorov kaj melodio de Krum Tabakov, kaj „Germana kanto“ de Ŝuberto, Stefan Spaskulov — per la popola kanto „Bela Kalina“ en traduko de

Asen Grigorov kaj ario el la opero „Simona Bocanegra“ de Verdi; korda trio de Elena Taskova, Elisaveta Arnaudova kaj Vladimir Dojĉinov — per „Caro mio Ben“ de T. Giordani kaj „Menueto“ de Boccerini; la merita artisto-pianisto Anton Dikov — per „Intermezzo“ de Brahms kaj „Preludo“ de Panĉo Vladigerov.


Komenciĝis la oficiala parto de la celebrazo. Sur la podio okupis lokojn la prezidantaro: la E-veteranoj Atanas D. Atanasov — Ada, vicprezidanto de l'Akademio de Esperanto, prof. d-ro Stojan Ĝuĝev — membro de l'Akademio de Esperanto, prof. Vasil Peevski — prezidanto de la Unuiĝo de Scienc-Teknikaj Asocioj en Bulgario, Angel Todorov — verkisto, ĉefredaktoro de gazeto „Balgaro-Săvețska Drujba“, Slavĉo Radomirski — generalo, Ĥristo Gorov kaj inĝ. Simeon Simeonov — vicprezidantoj de BEA, Georgi Dolapĉiev — prezidanto de la Sofia DK de BEA, Nano Nanov — prezidanto de E-Societo „Maksim Gorkij“, Draguŝko Petrov — el la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio, Trajana Petkova — sambatalanto de la celebrato, Kunĉo Vălev — ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ kaj instruanto de Esperanto en la Sofia Universitato. Centran lokon en la prezidantaro okupis la kara jubileulo kaj lia edzino Ljuba Grigorova.

Pri la vivo kaj E-agado de Asen Grigorov parolis Ĥristo Gorov.

La edikton, per kiu la Ŝtata Soveto honoris k-don Grigorov per alta ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — I grado, tralegis K. Vălev.

Sekvis multaj salutoj kaj enmanigo de memordonacoj fare de organizaĵoj kaj apartaj esperantistoj el Sofio kaj la tuta lando: en la nomo de la Estraro de CK de Bulgara Esperantista Asocio — inĝ. S. Simeonov, de la Sofia DK kaj la partia organizaĵo ĉe la Estraro de CK de BEA Georgi Dolapĉiev, de la Estraro de l'Asocio de Bulgara Verkistoj — Angel Todorov, de la Bulgara E-Kooperativo — Jordan Ĉalĵovski, de IPTA — Draguŝko Petrov, de Bulgara E-Junularo — inĝ. Angel Todorov, de DK de BEA en Plovdiv — Fani Miĥajlova, de E-Societo „Kulturo“ en Plovdiv — Ivan Bataklijev, de DK de BEA en Ĥaskovo — inĝ. Nikola Uzunov, de la Poŝtista E-Societo „Heroldo“ en Sofio — Ivanka Nedeva, de E-Societo „M. Gorkij“ en Sofio — Nano Nanov, de la Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“ en Sofio — Kunĉo Vălev, de la E-Societo de blindaj esperantistoj en Sofio — Tanja Ruseva, de la E-Sekcio de Sciencaj Agantoj — prof. Vasil Peevski, de la Literatura Rondo en Sofio — Ljuba Bojaĝieva, de la Virina Komisiono de BEA — Trajana Petkova, de la Scienc-teknika Sekcio de BEA — Georgi Dokov, de la Jurista Sekcio de BEA —

La prezidantaro



La sukcesplena evoluo de la E-movado en nia lando, ĝia aŭtoritato ŝuldiĝas al la aktiva, persista kaj sindona laboro de kelkcentoj da gvidantoj, kiuj dum jardekoj dediĉas sian energion por esperantigi novajn adeptojn kaj multigi nian anaron, por eldoni lernolibrojn, vortarojn, gazetojn, legaĵojn.

Unu el tiuj elstaraj kaj nelacigeblaj pioniroj estas kamarado Asen Grigorov.

Pasis pli ol kvar jardekoj de la jaro, kiam mi konatiĝis kun Grigorov en lia modesta dometo sur strato „Oĥrid“. Tiam li loĝis kun sia estimata edzino Ljuba en la proleta kvartalo de Sofio. Eble ankaŭ tiu cirkonstanco havis sian influon al la vivovojo de Grigorov.

En tiu kvartalo li observis ne nur la mizerantajn laboristajn familiojn. Li observis kaj admiris la batalantojn, kiuj alten levis la standardon de l' komunismo. Tiutempe la centro de Sofio apartenis al la burĝaro, al altrangaj oficistoj, bankdirektoroj, oficiroj kaj politikaj agantoj. La revolucia forto de la Komunista Partio ŝprucis en la malriĉulaj kvartaloj de la ĉefurbo, kie loĝis fuĝintoj el Makedonio, apudegea Trakio kaj Dobruĝa.

Kiam fondiĝis Laborista Esperanto-Asocio, Asen Grigorov elpasis per siaj verkoj dum niaj kunvenoj kaj konferencoj.

Li gajnis nian simpatian ne nur per sia modela karaktero, sed ankaŭ per siaj poeziaĵoj, en kiuj spiris la strebo al socia libereco, bolis malamo al subpremantoj kaj faŝistoj.

En la komenco de la tridekaj jaroj sub tutolo „Ruĝa Aŭroro“ aperis bukedo de revoluciaj poemoj. Ĉi versaĵoj laŭdas la klasbatalantojn, alvokas nin defendi la sovetan popolon, esprimas la kredon de la aŭtoro je la fina venko. Por ni ĉi tiu malmultpaĝa libreto, subskribita per la pseŭdonimo „Ljubin“, estis vera ruĝa aŭroro, radiantanta super la horizonto.

Dum la faŝista diktaturo, kiam furiozis la cenzuristoj, estis vivdangere streĉi la kordojn de la proleta liro kaj pri-kanti la liberecon. Por Asen Grigorov tio estis multe pli danĝera, ĉar li ofi-cis en diversaj ŝtataj institucioj — Ministerioj de Popola Klerigo, de Internaj Aferoj, de Poŝto kaj Telegrafo. Tiam la faŝistaj aŭtoritatuloj severe persekutis ĉiujn bulgarajn verkistojn kaj ĵurnalistojn, kiuj staris ĉe la flanko

Genĉo Genĉev, de la Medicinista Sekcio de BEA — d-ro Stojan Moresku, de la Bulgara E-Muzeo — d-ro Boris Nedkov, de la E-Societo de Aŭtotransporto en Sofio — Stefan Ganĉev, de Studenta E-Societo „Vela Peeva“ en Sofio — Ljubka Nikolova, de E-Societo „Ĥristo Botev“ ĉe la Ministerio de Transporto — Vera Nikolova, k. a.

Estis tralegitaj salutleteroj kaj saluttelegramoj: de la Unuiĝo de Bulgaraj Ĵurnalistoj, de la eminenta verkisto Georgi Karaslavov, de la konataj E-poeтиноj Hilda Dresen el Estonio kaj Ljudmila Jevsejeva el Latvio, de la E-poe-to Venelin Mitev kaj lia edzino, laborantaj nun en Moskvo, k. a.

Alvenis multaj aliaj salutleteroj el la lando kaj eksterlando, inter kiuj: de la E-rondo „Fajrero“ en la lernejo de Ziemeri, Latvio, de la esperantistoj de Odesa, subskribita de N. Sigal, de la soveta verkisto Rasul Gamzatov,

laŭreato de Lenin-premio, de la famekonata angla E-poeтино Marĵorie Boulton, de ing. R. Haferkorn el GFR, akademiano, de V. Fedotov el Uljanovsk, USSR, kma.

La kara jubileulo, kortuŝita de la esprimita al li estimo kaj amo, dankis per emociaj vortoj, deklarante, ke ĝis sia lasta spiro li labo-ros kaj batalos por la triumfo de nia kara lingvo Esperanto, por la kultura supreniro de nia Patrolando, por la amikeco inter la popoloj kaj la paco sur la tero.

La celebrego de nia E-veterano kaj poeto Asen Grigorov transformiĝis en veran feston por la sofia esperantistaro. Ĝi forte impresis la ĉeestantan publikon, speciale la junularon kaj la novajn esperantistojn, instruis ilin en spirito de estimo al niaj E-veteranoj, de fideleco kaj sinoferemo al Esperanto kaj al la Esperanto-afero.

K. Vălev

de la klaskonscia proletaro kiel politika avangardo. Ĉe tiaj cirkonstancoj A. Grigorov sentime daŭrigis sian verk-laboron por progresemaĵ esperantistoj.

Do, Grigorov komencis sian Esperanto-laboron antaŭ duonjarcento. Unue li kunlaboris al „Bulgara Esperantisto“ kaj al „Balkana Konkordo“. En la fino de la tridekaj jaroj li kune kun Nikola Aleksiev, Atanas Lakov kaj Simeon Petrov partoprenis la redaktadon kaj eldonadon de „Balkana Laboristo“.

Dum la sama periodo en nia E-movado formiĝis taĉmento da tradukistoj kaj originale verkantaj — Ivan Dobrev, Dimitr Zlatarski—Miti, Ĥrima, D. Sasonov, Kruco, A. Lakov — kiuj enviciĝis post A. Grigorov. Iliaj verkoj aperadis ankaŭ en internaciaj ĵurnaloj: „Sennaciulo“ (antaŭskisma periodo), „La Nova Epoko“, „Internaciisto“, „La Praktiko“, „Heroldo de Esperanto“, „Verda Stelo“ k. a.

Gravan rolon ludis la gvidata de Nikola Aleksiev gazeto „Rabselkor“. Ĝi estis taksata kiel la pli juna frato de „Pogled“. Al ĝi aligis siajn fortojn A. Grigorov. En tiu ĉi periodaĵo plej ofte aperadis korespondaĵoj de советaj laboristoj-esperantistoj. Dank' al tio „Rabselkor“ tre efike propagandis la atingaĵojn de la socialismo en la unua laborista-kamparana ŝtato—USSR.

Dum la jaroj 1937—1938 A. Grigorov fondis kaj redaktis la Esperanto-paĝon de la ĉiutaga ĵurnalo „Zarja“.

Krom en la gazetoj li laboris ankaŭ kiel vortaristo kaj kompilanto de lernolibroj.

Mi devas akcenti, ke lia Esperanto-agado ne lasis lin stari flanke de la organizita laborista movado, gvidata de la Komunista Partio.

Lia partieca kaj popoleca verkado estas ŝuldata al la komunistaj ideoj. La laboristan movadon li ne subtenis flankestarante de la ĉiutaga batalo, sed jam en 1928 j., kiam fondiĝis RMS (Laborista Junkomunista Unuiĝo), li

aligis al ĝi. Post unu jaro oni lin akceptis en la vicojn de la Partio.

En ĝi li ne restis nura soldato. Oni elektis lin sekretario de partia ĉelo ĉe la Ŝparkaso, kiu tiutempe funkciis en la kadroj de Ministerio de Poŝto kaj Telegrafo. Samtempe li estiĝis membro de partia komitato en la centra parto de Sofio.

Sed ĉiam lia preferata okupo estis la verkado. Li redaktis kaj eldonis „Kablo“, „Telefono“, „Telegrafopoŝtisto“ k. a. nelegalajn gazetojn.

Denuncantoj ekflaris lian agadon kaj sekvis eksigo el la oficejo.

Asen Grigorov fariĝis profesia revoluciulo. Sub direktado de Vlado Georgiev li laboris en nelegala presejo de Centra Komitato de la Partio. En 1941 j. la polico malkovris la presejon kaj kaptis la redaktorojn kaj la teknikajn kunlaborantojn. Asen Grigorov eniris la Centran Malliberejon en Sofio. Li restadis en la prizonoj de Sofio, Pleven, Blagoevgrad, v. Breĵane. Ankaŭ ĉi tie, en la ĉeloj, li daŭrigis sian agadon; li sukcesis organizi kaj eldoni esperantlingvan mane skribatan gazeton „La Kajero“.

Grigorov eliris el la prizono en 1943 j. La faŝista teroro estis senindulga. Tamen li ne kapitulacis antaŭ la obstakloj. La Ruĝa Armeo, kiun li atendis jam dudek jarojn, proksimiĝis al la norda limo de Bulgario. Tio estis signalo por ribelo. Je la 6-a de septembro 1944 j. Grigorov partoprenis la stratajn demonstraciojn en Sofio. Oni arestis kaj malbontraktis lin. Malgraŭ tio li faris sian devon kiel ribelulo. La 9-an de septembro li renkontis kun ĝojo kaj entuziasmo la unuan vere popolan registaron en Bulgario.

Kiel fidela kaj konsekvenca kontraŭfaŝisto li estis enoficigita en la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio.

Kiam el Sovetunio revenis Georgi Dimitrov, Grigorov fariĝis lia unua sekretario. Pli poste li transiris al la

Komitato de Ŝtata Kontrolo, kie li redaktis la revuon „Ŝtata Kontrolado“.

En 1958 j. li emeritiĝis, sed por li tio ne signifis ripozon. Li dediĉis sin tute al la Esperanto-movado.

Dum la jaroj 1945—1949 Grigorov estis ĉefredaktoro de „Internacia Kulturo“. Post ties ĉesigo li fariĝis ĉefredaktoro de „Nuntempa Bulgario“.

Tiu periodo estas treege fruktodona kaj utila por nia lando, konstruanta socialismon. „Nuntempa Bulgario“ havis pli ol 10 000 abonantojn en la tuta mondo. Dank' al ĝi la monda esperantistaro informiĝis pri la novaj vivkondiĉoj en nia lando, pri la rimarkindaj atingajoj de nia libera popolo. Asen Grigorov penadis ĉiel por fari „Nuntempa-n Bulgario-n“ serioza kaj enhavoriĉa revuo. Li arigis ĉirkaŭ la Revuo junajn esperantistojn, utiligis la spertojn de la maljunaj.

„Nuntempa Bulgario“ regule aperigis artikolojn kaj ilustraĵojn pri la socialisma konstruado en niaj urboj kaj vilaĝoj, skizojn kaj raportaĵojn pri la novaj homoj de Bulgario, tradukojn de klasikaj kaj nuntempaj aŭtoroj. Sur la paĝoj de la revuo oni ĉiam trovis interesaĵojn pri la Esperanto-movado — nacia kaj internacia. „Nuntempa Bulgario“ konkeris por si ŝatindan lokon en la tutmonda esperantista gazetaro.

Post la ĉesigo de „Nuntempa Bulgario“ A. Grigorov ne krucis la manojn. Li estas la fondinto kaj gvidanto de la Literatura Esperanto-Rondo en Sofio kaj unua prezidanto de la Sekcio de

Esperantistaj Literatoroj en Bulgario (SELEB), redaktas la kelkjaran bul-tonon „Interligilo“ — organo de la Internacia Ligo de Poŝtistoj-Esperantistoj. Li ankaŭ estas redakciano de „Bulgara Esperantisto“ kaj de „Juna Amiko“, aperanta en Hungario.

Sub liaj zorgoj maturiĝas novaj Esperanto-poetoj kaj verkistoj en nia lando.

Kiel la bulgaraj esperantistoj, tiel ankaŭ la internacia esperantistaro, kiu ofte invitis lin al siaj kulturaj aranĝoj tre alte taksas Asen Grigorov.

Tion li atingis per sia modesta vivmaniero, per sia originala verkaro, per la multnombraj tradukoj el la bulgara lingvo, modelaj laŭ lingva vidpunkto, per siaj lernolibroj kaj vortaroj, destinitaj por lernado kaj perfektigo en la Internacia Lingvo.

Pro sia duonjarcenta laboro A. Grigorov ricevis antaŭ nelonge altan ŝtatan ordenon.

50 jarojn por Esperanto! Dum tiuj 50 jaroj li enmetis multajn orajn brikojn en la fundamenton de nia verdstela konstruaĵo.

En la nomo de la Centra Komitato de BEA, kies membro Asen Grigorov estas depost 1945 j., mi tutkore deziras, ke li restu ankoraŭ longajn jarojn junkora kaj verk-kapabla, ke li laboru por nia Movado kun la sama persisto, aktiveco kaj sindono!

Kune kun miloj da bulgaraj esperantistoj mi salutas lin:

Gratulon kaj plenforte al la 80!

VERKOJ DE ASEN GRIGOROV

Eldonitaj libroforme

GRIGOROV Asen. *Garbo*. Originala poemaro. Eldonejo „Pelikan“, Sofio, 1930, 31 p., 1000 ekz. 8^o.

M. LJUBIN (Asen Grigorov). *Ruĝa aŭroro*. (Antaŭparolo de A. F.). Balkana Laboristo, Sofio, 1930, 30 p., 1000 ekz. 8^o. Bibl. „Balkana laboristo“, n-ro 1.

— 2-a eld., „Ekrelo“, Leipzig, 1932.
M. LJUBIN (Asen Grigorov). *La Himno*. Novelaro. „Ekrelo“, Leipzig, 1931, 36 p. 8^o.
GRIGOROV Asen. *Organizado de la korespondado*. Raporto de . . . En la libro „Unua libera kongreso 1945“, Sofio, 1946, p. 9—22.

M. LJUBIN (Asen Grigorov). *Fabriko, Laboristinoj*. El Poemo pri la tabaklaboristo. (Versaĵoj). En la libro „Esperanta Antologio“. Poemoj 1887—1957. „Stafeto“, la Laguna, 1958, p. 244—246.

M. LJUBIN (Asen Grigorov). *Vojko*. (Rakonto). En la libro „33 rakontoj“. Esperanta novelkolekto. „Stafeto“, la Laguna, 1964.

ГРИГОРОВ Асен. *Пролетарски курс по есперанто*. Практическо ръководство за изучаване на международния език есперанто. Нагледено за българи от М. Л. (Асен Григоров). По С. Рублев, Работнически есперантски съюз, София, 1932, 64 с., 80.

ГРИГОРОВ Асен. *Proleta kurso de Esperanto*. Praktika gvidlibro por lernado de la internacia lingvo Esperanto. Adaptita por bulgaroj de М. Л. (Асен Григоров). Laborista Esperanto-Asocio, Sofio, 1937, 64 p., 80.

— 2 изд., София, 1937, 64 с., 2500 екз., 80.

— 3 изд., „Наркоопиздат“, София, 1945, 76 с., 13000 екз.

— 4 изд., „Народна култура“, София, 1949, 119 с., 6000 екз., 80.

— 5 изд., Българска есперантска кооперация, София, 1960, 1000 екз., (Циклопечат).

ГРИГОРОВ Асен. *Как да предаваме есперанто по пряката говорна метода на С. Рублев*. Помагало за ръководители на есперантски курсове. Работнически есперантски съюз, София, 1932, 32 с., 1000 екз., 160.

ГРИГОРОВ Асен. *Kiel instrui Esperanton laŭ la rekta parolmetodo de S. Rubljov*. Helpilo por gvidantoj de E-kursoj. Laborista Esperantista Asocio, Sofio, 1932, 32 p., 1000 ekz., 160.

— 2 изд., София, 1938, 31 с., 300 екз., 80.

ГРИГОРОВ Асен. *Българо-есперантски речник*. (Bulgara-Esperanta Vortaro). Работнически есперантски съюз, София, 1931, 190 с., 2000 екз., 160.

— 2 изд., София, 1938, 192 с., 1000 екз., 160.

— 3 изд., „Народна култура“, София, 1946, 208 с., 5000 екз., 160.

— 4 изд., Българска есперантска кооперация, София, 1960, 208 с., 5000 екз.

— 5 изд., Български есперантски съюз, София, 1969, 208 с., 10 000 екз.

ГРИГОРОВ Асен. *Есперанто-български речник*. (Esperanto-bulgara vortaro). Работнически есперантски съюз, София, 1930, 96 с., 1500 екз., 160.

— 2 доп. изд., София, 1932, 104 с., 2000 екз., 160.

— 3 изд., София, 1939, 104 с., 3000 екз., 160.

— 4 доп. изд., „Наука и изкуство“, 1956, 160 с., 8063 екз., 160.

— 5 изд., Българска есперантска кооперация, София, 1960, 104 с., 5000 екз., 160.

— 6 изд., Български есперантски съюз, София, 1969, 105 с., 10 000 екз., 160.

Kr. Karucin

Niaj Esperanto - pioniroj

KRÂSTJU JANEV SIVRIEV

Krâstju Sivriev estas unu el la unuaj pioniroj de la Esperanto-movado en nia lando. Li naskiĝis je la 1. I. 1880 en Ĥaskovo en la familio de metiisto. Fininte gimnazion en Plovdiv, li tuj fariĝis instruisto. Tia li restis dek jarojn. Dum tiu tempo Sivriev ekkonis la socialismon kaj estis unu el la unuaj socialistoj en Ĥaskovo. En 1910 li forlasis la lernejon kaj ekstudis juron en la Sofia Universitato. Poste li translokiĝis en Svislandon kaj finstudis la juron en Ĝenevo. La ceteran parton de sia vivo li laboris en Ĥaskovo kiel advokato. Mortis la 9-an de februaro 1959.


Sivriev ekinteresiĝis pri Esperanto en la komenco de nia jarcento. Ler-

nante aŭtodidakte la lingvon, li konatiĝis kun multaj eksterlandaj esperantistoj. Sub lia gvido lernis la lingvon pluraj grupoj da lernantoj, kolegoj kaj oficistoj. Aktivан E-agadon li disvolvis ĉe la esperantista societo en Ĥaskovo, fondita en 1903. En 1904 li komencis traduki kaj adapti por bulgaroj la ĵus eldonitan en Parizo „Komentario de la Esperanto-gramatiko“ de Louis de Bofront. Li devigis sin fari la tradukon laŭ la rekomendo de la Esperanto-Klubo en Plovdiv, sed ne estas sciate, ĉu ĝi estis eldonita. En 1907 Sivriev tradukis en Esperanton la rakonton de Ivan Vazov „Ĉu li venas“, kiu aperis en la numeroj 8—9 de la revuo „Lingvo Internacia“ en Parizo.

La Esperanto-agado de Sivriev estis koncentrita en la klubejo de la socialistoj „Naroden Dom“ kun interrompoj ĝis 1924, kiam li ekagis en la restarigita Esperanto-societo. Unu el liaj disĉiploj estis ankaŭ d-ro Stefan Kadiev, dum tiu tempo studento de medicino.

Kiel homo kaj civitano Kr. Sivriev havis la nomon de bona advokato, honesta, nesubaĉetebla, posedanta grandan aŭtoritaton antaŭ la civitanaro. Pro tio en 1934 li estis elektita kiel urbestro de Ĥaskovo. Ĉe la tutpopola enterigo de la granda socialista kaj progresema soci-aganto prof. d-ro Asen Zlatarov en 1936 j. Sivriev kiel urbestro de lia naskiĝurbo, malgraŭ la oficiala malpermeso, iris Sofion kaj faris antaŭ la tombo belegan prelegon (li ĝuis la famon de granda oratoro). Post lia reveno li estis eksigita de la posteno de urbestro fare de la monarkofaŝista potenco kaj eklaboris denove kiel advokato.

Tre honesta kaj modesta, Sivriev ne ŝatis bruadi ĉirkaŭ si kaj laboris ĉiam



senpage kaj obstine por Esperanto. Lia agado tamen havas signifon ne nur por la Esperanto-movado en Ĥaskovo, sed ankaŭ por la tuta lando.

Boris Kolev, d-ro Stefan Kadiev

OVAJ AKIRAĴOJ DE NIA POPOLO

La Decembra Plenkunsido de CK de Bulgara Komunista Partio (1972) akceptis vastan programon por plialtigo de la vivnivelo de nia popolo. En marto ĉ. j. tri novaj dokumentoj konkretigis la plenumon de la partia programo: la decido de la Politika Estraro de CK de BKP por plialtigo de la rolo de l'virino en la konstruado de matura socialisma socio, la dekreto de la Ministra Soveto kaj de CK de la Bulgaraj Sindikatoj por plialtigo de la salajroj de iuj kategorioj de laboruloj kaj la dekreto pri mallongigo de la labortempo kaj enkonduko de kvintaga laborsemajno.

La unua el tiuj ĉi dokumentoj havas ekskluzive grandan signifon: ĝi komplete pritraktas la problemon pri la rolo de la virino en nia lando — nun kaj en estonteco. Kreiĝas kondiĉoj por forigo de iuj misproporcioj inter la okupoj de la virino kiel laborulo kaj ŝiaj devoj kiel patrino kaj edukanto de siaj infanoj. Samtempe kreiĝas eblecoj por pli vastaj manifestiĝoj de la virino en nia socia vivo.

La dua dokumento — la dekreto de la Ministra Soveto kaj de CK de la Bulgaraj Sindikatoj — donas avantaĝon por plialtigo de la salajroj de la malalte pagitaj laboruloj, de la laboristoj, okupitaj per subtera laboro, ĉe

malfacilaj kaj malfavoraj kondiĉoj, kaj de iuj laboruloj en la sfero de la socia priservado. La minimuma monata salajro de la laboristoj kaj oficistoj estiĝas 80 levoj, senimposta. Plialtiĝas per 16% ankaŭ la salajroj de instruistoj, kuracistoj kaj sanlaboristoj, de sciencaj laboristoj en la Bulgara Akademio de la Sciencoj, de la laborantoj en la belartaj institutoj (teatro, opero) k. a.

La dekreto de la Ministra Soveto kaj de CK de la Bulgaraj Sindikatoj por enkonduko de malmultigita labortempo kaj kvintaga laborsemajno estas nova granda socia akiraĵo de nia popolo. La pli multa libera tempo permesos al la laboruloj plialtigi sian spiritan nivelon, kontentigi pli larĝe siajn kulturajn bezonojn.

La bulgaraj esperantistoj, kiel membroj de la laborkolektivoj en nia lando, renkontas la tri novajn dokumentojn kun granda ĝojo kaj plena kontentigo. Per sia konsienca laboro ili ĉie kaj ĉiam kontribuos por pli baldaŭa realigo de la grandaj planoj de nia popola ŝtato survoje al feliĉa estonto, al komunismo.

Nenko Jonkov

ORGANIZA VIVO

NIAJ JARKUNVENOJ

Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“

La jarkunveno de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ okazis en plenplena salono.

La prezidanto de la societo Nanov faris detalan raporton pri la agado de la societa estraro kaj de la societo mem dum la pasinta jaro. En la enkonduka parto li parolis pri la enlanda kaj internacia politika kaj ekonomia situacio, notante la gravan venkon de la vjetnama popolo super la arogaj sangaj invadintoj — la usonaj imperiistoj, kaj la laboron de la Eŭropa Konsulta Konferenco en Helsinki — Finnlando, kiu tiumomente kunidis por prepari la problemojn de tuteŭropa konferenco por konservo de la paco kaj la sekureco en Eŭropo.

Plue la raportanto notis, ke la organiza kaj kultura vivo de la societo dum la jaro pasis sur la fono de gravaj naciaj kaj internaciaj E-iniciatoj, en kiuj aktive partoprenis centoj da bulgaraj esperantistoj, ankaŭ membroj de s-to „Maksim Gorkij“.

Dum la raportita jaro estis organizitaj 47 kunvenoj, kiuj okazis ĉiumerkrede. La tagordoj estis tre variaj. Ĉe plej granda intereso kaj amasa vizito fare de la sofia esperantistaro estis celebritaj la jubileojn de kelkaj esperantistoj-veteranoj: la 80-jariĝon de Atanas D. Atanasov — Ada kaj Meleŝko Ŝiŝkov, la 70-jariĝon de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev, Asen Grigrov kaj Evstati Cifudov, ankaŭ la 35-jaran teatran agadon de la artisto Anani Anev, unu el la fondintoj de la Bulgara Esperanto-Teatro.

Kelkaj kunvenoj estis organizitaj kun kulturaj centroj de iuj amikaj socialistaj landoj: kun la Hungara Kulturcentro — dediĉe al la nacia festo de Hungara Popola Respubliko, kun la Kultura Centro de GDR — dediĉe al la 90-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov.

Je dispono de la membroj estas la societa biblioteko, kiu disponas pri pli ol 600 E-titoloj.

Dum la pasinta jaro la societo havis 350 regulajn membrojn. Kvankam ĝenerale bona, la laboro de la societo havas ankaŭ iujn mankojn kaj negativajn flankojn.

Ne estas sufiĉe bone spegulita la riĉa diversflanka laboro de la societo en nia enlanda Esperanta kaj neesperanta gazetaro (ni ne parolu pri la eksterlandaj). La pervida propagando estas tute nekontentiga. Malbone estas organizita la varbado de abonantoj de la E-gazetaro. Multaj membroj ne estas abonantoj kiel al „Bulgara Esperantisto“, tiel al „Paco“, „Internacia Ĵurnalistoj“ k. a. Nesufiĉa estas la porkursa laboro, speciale la kursoj por progresintoj. Apenaŭ nun la estraro de la societo alpaŝas serioze al la grava problemo organizi junularan grupon.

Post la elĉerpa raporto de la prezidanto kaj la vigla diskutado estis akceptita rezolucio, kiu antaŭvidas konkretajn taskojn por forigi la supremenciitajn kaj aliajn mankojn.

Fine estis elektita la jena nova estraro:

Nano Nanov — prezidanto, Ivan Keremidĉiev-Esperov — vicprezidanto kaj respondeculo pri la kleriga laboro, Ivan Tanev —

vicprezidanto kaj resp. pri la kursoj, Marin Marinov — sekretario, Maria Minčeva — kasistino, la artistino Belka Beleva — resp. pri la kulturamasa laboro, Ivan Iliev — resp. pri la internaciaj ligoj, Kostadin Cenov — resp. pri la ligoj kun la junularo, Maria Genova — bibliotekistino.

La elektita kontrolo komisiono konsistas el: Stefan Jončev — prezidanto kaj membroj: Marin Petkov, Boris Tonev, Apostol Penčovski.

M. Conkovski

E-Societo „Espero“ — Polski Trâmbeș

La raporton pri la pasintjara agado de E-Societo „Espero“ ĉe la Bazo por Teknika Evoluado en u. Polski Trâmbeș legis k-dino Anka Nikolova — la prezidanto.

La societo estas tute nova — fondita je la fino de 1971 j. Ĝi havas 23 regulajn membrojn, inter kiuj ankaŭ la partia sekretario de la entrepreno St. Makaveev. Bone rilatis kaj subtenis la societan agadon la administra gvidantaro (k-doj Spirov, Karaivanov), la Sindikata Komitato ĉefe kun sia prezidanto Georgi Pančev k. a.

Dum 1972 j. estis organizitaj 2 E-kursoj, la dua el kiuj finiĝis per amuza programo. La Sindikata Komitato premiis ĉiujn sukcese finintajn per E-libroj.

Multaj membroj jam aktive korespondas kun USSR, Pollando, GDR, Belgujo, Hungario, Usono, Kanado, ĈSR, GFR k. a. Bonajn ligojn kreis la societo kun lerneja kolektivo en u. Ziemi, Latva SSR, kun la Domo de Sciencistoj en Taŝkent, Uzbeka SSR. Rezultodona montriĝis ankaŭ la speciala korespondado. Pere de Esperanto la entrepreno kreis kontaktojn kun eksterlandaj firmoj, sciencaj institutoj k. a., kiuj havigis al ĝi projekt-materialojn por la specialistoj, katalogojn k. a. Helpis esperantistoj kaj firmoj el Svedio, Hungario, Brazilo, Finnlando, Ĉeĥoslovakio k. a., kiuj korespondas ankaŭ en Esperanto en la kolektivo de la entrepreno.

Kelkaj el la kulturaj kunvenoj de la E-Societo transformiĝis en ĝeneralajn, ĉar ĉeestis la tuta kolektivo, ekz. la kunveno pri „La internacia aŭtoritato de G. Dimitrov“. Fakte la raporto de tiu kunveno konsistis el E-leteroj el eksterlando, legitaj de apartaj esperantistoj.

Ekskluzive gravan signifon havis la 3 ekspozicioj, organizitaj de la societo. Ili estis efektivigitaj kune kun la partia, komsomola kaj sindikata organizaĵoj, kun la amasaj organizaĵoj kaj la Popola Soveto. La unua ekspozicio estis organizita sub la slogano „La mondo batalas por paco kaj pli feliĉa vivo“, la dua — „La mondo estimas la memoron de Georgi Dimitrov“ kaj la tria — „50 jarojn USSR“.

Granda parto de la materialoj por la tri ekspozicioj estis ricevita el eksterlando pere de Esperanto. Valoraj materialoj por la ekspozicioj estis senditaj el USSR, Usono, GDR, Pollando, ĈSR, Francio, Peruo, Ĉilio, Japanio k. a. Parto de la materialoj estis publikitaj en la distrikta ĵ. „Borba“ (Batalo) kaj la loka ĵ. „Podem“ (Supreniro). Iuj estis legitaj antaŭ la tuturba solena kunveno dediĉe al la 90-a naskiĝtago de G. Dimitrov, aliaj — pere de la urba radio-reto.

La menciitaj tre fruktodonaj iniciatoj montras kiom utile estas kunligi la E-agadon kun la konkretaj politikaj taskoj kaj, plej grave — akordigi ĝin kun la aliaj amasaj organizaĵoj en la entrepreno (oficejo) kaj la loĝloko.

Ĉiumonate en la entrepreno aperis Esperanta murgazeto aŭ agittabulo.

La societo disvolvis ankaŭ vigan turistan agadon. Tio preskaŭ ĉiam estis farata kune kun la aliaj organizaĵoj — turista, komsomola, sindikata. Nur esperantistaj estis la ekskursoj ĝis Trojan — al la junulara renkontiĝo ĉe „Beklemeto“ (16 membroj de „Espero“) kaj al la 38-a Kongreso de BEA en Smoljan (14 membroj). Ĉiu membro de la societo sendis al ĉiu sia eksterlanda korespondanto la belegan Esperantlingvan broŝuron „Bulgario“.

La riĉa kaj varia agado de E-Societo „Espero“ estis vaste spegulita en la bulgara, Esperanta kaj neesperanta gazetararo, ankaŭ en eksterlandaj E-periodaĵoj. Al ĝi estas dediĉitaj 10 disaŭdigoj de la loka radio-reto kaj unu 15-minuta — de la distrikta radio-reto. Tiu lasta estis aŭskultita en la tuta distrikto.

La raporto kaj la diskutado starigis pluajn taskojn de la societo: plimultiĝi la membraron, plibonigi la alproprigon de la lingvo, vaste partoprenigi la E-korespondadon, partopreni en pli da renkontiĝoj kun alilokaj esperantistoj, en pli da ekskursoj kaj turistaj iroj k. s.

Fine estis elektita la jena estraro: Minčo Angelov — prezidanto, Anka Nikolova — vicprezidanto, Marija Ilieva — sekretario, Ljuben Miĥajlov — kasisto, Marija Bojaĝieva — kultur-amasa laboro. Kontrolo komisiono: Anton Ivanov — prezidanto kaj membroj: Stojanka Lambeva kaj Canka Jordanova. Helpe al la estraro estis elektitaj kelkaj komisionoj (por vida agitado, por sporto kaj turismo, por E-programoj, por radio-disaŭdigoj) kaj apartaj respondeculoj (por abonigoj kaj raportajisto).

Post la fermo de la kunveno sekvis amika vespermanĝo.

Anka Nikolova

E-Societo „Roza Valo“ — Kazanlâk

La estrara raporto, legita de k-do Dimo Martinov — prezidanto de „Roza Valo“, substrekis, ke la bona laboro dum la pasinta jaro aktivigis la societon. En la societa klubo funkciis E-kurso por civitanoj kaj en la Dom-

konstrua Teknikumo — por lernantoj. Kurso por lernantoj, organizita de nia societo, estis ankaŭ en vilaĝo Enina. Tre bonan efikon havis la kunvenoj-renkontiĝoj kun esperantistoj el Sofio kaj Plovdiv lige kun la 90-a naskiĝtago de Georgi Dimitrov.

La diskutojn partoprenis 11 gesamideanoj. La kunvenon ĉeestis s-no Sinkov el la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio, kiu en sia salutparolo substrekis, ke la E-movado devas trovi novajn agadformojn por nepre altiri la junularon. Li deklaris, ke la UK de BKP taksas tre pozitive la laboron de la esperantistoj kaj donos ĉian helpon al „Roza Valo“.

Unuanime estis elektita nova estraro: Dimo Martinov — prezidanto, Ŝinka Geneva — sekretario, Donĉo Ĥristov — kasisto, inĝ. Svoboda Damjanova — kulturamasa laboro, Nanjo Dimov — E-kursoj, Ĥristo Kurumilev — korespondanto kaj Ivanka Krалеva — junularo

Ĥr. Kurumilev

E-Societo „Vekiĝo“ — Ŝumen

Jam 68 jarojn la esperantistoj de Ŝumen, organizitaj en sia societo „Vekiĝo“, obstine kaj senlace laboras por disvastigo de la Internacia Lingvo, kontribuas por la kultura progreso de sia urbo kaj amikeco en la mondo.

La jarkunveno de Bulgara

La unua parto de la ĉi-jara 27-a jarkunveno de Bulgara Esperantista Kooperativo estis dediĉita al la 70-jara datreveno de l' naskiĝo de Evstati Cifudov — unu el la fondintoj de la Kooperativo, ties longjara direktoro kaj nun honora prezidanto, kiu multe kontribuis por ĝia prospero. Raporton pri lia vivo kaj agado faris la membro de la Administra Konsilantaro de BEK Boris Popov. Sekvis salutparoloj. Unua en la nomo de CK de BEA salutis lin Nikola Aleksiev — prezidanto de l'Asocio. Salutante la celebraton, la nuna prezidanto de BEK Dimitr Conev notis lian gravan rolon kaj kontribuon por ĝia komenca stabiliĝo kaj plua disvolviĝo kaj enmanigis al li horloĝon. Salutojn prezentis ankaŭ: Nano Nanov, prezidanto de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ — en la nomo de la societa estraro kaj membraro, Minko Conkovski — la unua prezidanto de BEK — en la nomo de la kooperativaj membroj, doc. Georgi Dimov — en la nomo de la esperantistoj de Varna, Straŝimir Spasov el Smoljan, Georgi Balkanski el Vârșec, Radko Pironkov — longjara estrarano kaj vicprezidanto de BEK. Interalie tiu lasta substrekis, ke k-do Cifudov laboris kun eksterordinara entuziasmo ĉe plej malfacilaj kondiĉoj por la prospero de la Kooperativo kaj por la kreo de la Esperanto-Tendaro en Druĵevo.

Ĝojon kaj kontenton vekis la sukcesoj dum la pasinta jaro, pri kiuj parolis la jarraporto. La membroj de la societo plifortigis ligojn kun la esperantistoj el eksterlando, precipe kun la sovetaj. Bona fakto estas, ke la ligoj kun la aliaj urbaj amasaj organizaĵoj estas fortaj. Okaze de la 50-a jubileo de USSR per la helpo de la Komitato por Bulgara-Soveta Amikeco estis dissenditaj al centoj da sovetaj amikoj gratulleterojn. Kune kun la Komitato por Pacdefendo estis organizita la renkontiĝo de la delegacio de Vjetnama Pacdefenda E-Komitato por la 38-a Kongreso de BEA. La esperantistoj, membroj de la Patrolanda Fronto, aktive partoprenas en la vivo de ĝiaj kvartalaj organizaĵoj, kunhelpas por la patriotismo kaj internaciisma edukado de la popolo.

Varmajn bondezirojn direktis al ĉeestantoj de la jarkunveno Dimitr Ivanov — sekretario de UK de Patrolanda Fronto.

La kunveno emfazis, ke unu el la plej gravaj taskoj de ĉiu esperantisto estas entuziasme labori por plenumo de la ekonomiaj planoj, por realigo de la Decembra Programo de BKP por popola bonstato. Ĉiu esperantisto devas ankaŭ vaste konigi en eksterlando la sukcesojn de nia Respubliko [sur la vojo de la socialismo, la naturajn belaĵojn kaj rimarkindaĵojn de nia lando.

Cvĵatko Todorov

Esperantista Kooperativo

Fine k-do Evstati Cifudov kun profunda emocio dankis pro la esprimita atento al li kaj la enmanigitaj donacoj okaze de lia 70-jara naskiĝtago.

Post tiu solena parto sekvis la regula laborkunveno de la Kooperativo. La prezidanto D. Conev faris detalan raporton pri la agado de ĝia Administra Konsilantaro dum 1972 j. Li faris revuon de la internaciaj politikaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj, en kiuj la Kooperativo efektivigis siajn agojn dum la jaro: la decidoj de la historia X-a Kongreso de la Bulgara Komunista Partio por konstruo de matura socialisma socio en nia lando, la decidoj de la Decembra Plenkunsido de BKP pri plialtigo de la vivnivelo de la popolo, la disvolvo de la batalo por paco inter la popoloj de Eŭropo kaj de la tuta mondo, en kiu aktive partoprenas ankaŭ nia lando.

Dum la jaro estis varbitaj novaj 109 membroj kun 1247 levoj da kapitalkvoto. En la fino de la raportita jaro la Kooperativo havas entute 1638 membrojn kun 43 737 levoj da kapitalkvoto.

La Kooperativo efektivigas sian ekonomian agadon en du fakoj — komerca (librovendejoj) kaj produkta (laborejoj). La komerca konsistas el 12 librovendejoj kaj la produkta — el 13 laborejoj (precipe stencilejoj, kliŝo-presaja servo,

bindejo k. a.). En la ĉefurba kvartalo „Iztok“ (Oriento) estas aĉetita propra magazeno por librovendejo (80 kv. m), kiu baldaŭ devas esti finekipita interne. Tiu estas la unua magazeno de la Kooperativo en propra ejo, pri kiu fieras ĝiaj membroj.

En 1972 la Kooperativo plenumis sian planon 104% kaj la planon de la gajno 111%. Laŭ aktivo kaj pasivo ĝia financa stato estas bona. La neta gajno en 1972 j. estas 123 400 levoj. La Kooperativo elaĉetis la tutan eldonkvanton (10 000 ekz.) de la lernolibro de Sarafov — Ĥesapĉiev, eldonis Esperanto-bulgaran konversacilibron (15 000 ekz.), portreton de Georgi Dimitrov okaze de lia 90-jara naskiĝtago, havigis E-insignojn k. a. Ĝi organizis en Druĵevo (Balkanmontaro) E-kursojn en 3 gradoj — 2 por komencantoj kaj 1 por progresintoj. BEK financis la Esperanto-Muzeon (kovris ĝiajn elspezojn por korespondado, bindado de revuoj k. a. literaturo). Ĝiaj planoj antaŭvidas pluan eldonanon de E-libroj kaj literaturo. Dum la kuranta jaro ĝi daŭrigos la aperigon

de sia bulgarlingva informa bulteno „Esperantski Vesti“ (Esperanto-Novaĵoj). Denove ĝi organizos E-kursojn en Druĵevo.

La raporto de la Kontrola Komisiono, legita de ties prezidanto Srebrjo Petrov, atentigis pri iuj eraroj en la laboro de la Administra Konsilantaro de la Kooperativo kaj donis rekomendojn pri ilia forigo.

Sekvis viglaj diskutoj, kritikoj kaj proponoj fare de multaj kooperativaj membroj, venintaj el la tuta lando.

Fine estis akceptita rezolucio por plibonigo de la estonta laboro de la Kooperativo kaj elektitaj novaj Administra Konsilantaro kaj Kontrola Komisiono.

Estis aprobitaj la jenaj telegramoj: al Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, al CK de Bulgara Komunista Partio, al CK de BEA, al la Urba Kooperativa Asocio.

Ni kredas, ke la 27-a jarkunveno de BEK donos al nia Esperanto-kooperativo kaj de la ĝenerala E-afero novan puŝon antaŭen.

M. Conkovski

LA ESPERANTISTOJ DE ŜUMEN TRAKTAS LA DECEMBRAN PROGRAMON

La organiza agado de la esperantistoj en Ŝumen estas firme ligita kun la socia vivo en nia lando, kun la streboj de nia popolo efektivigi la decidojn de la X partia kongreso. Nun unua devo de ĉiu membro estas partopreni la realigon de la Sesa Kvinjara Plano. Por la konsekvenca konatiĝo de la societaj membroj kun la programo de la grava Decembra Plenkunsido de CK de BKP por tutpopola bonstato oni akceptis planon, laŭ kiu estos faritaj kelkaj raporto.

En majo antaŭ ĝenerala kunveno parolis k-do Petko Todorov el Distrikta Komitato de BKP. Li konatigis la ĉeestantojn kun la

ekonomia, kultura kaj socia progreso de nia distrikto dum la VI kvinjara plano. Lia interesa rakonto pri la grandaj reformoj, pri la prospero de Ŝumen kaj la distrikto, estis saturita per abundaj konkretaj faktoj kaj ciferoj kaj vekis grandan intereson. La ĉeestantoj direktis multajn demandojn. Ili deklaris, ke per sia korespondado ili konatigas la esperantistojn en eksterlando kun la progreso de nia lando laŭ la vojo de l' socialismo, vojo de feliĉo kaj tutpopola bonstato.

Cvjatko Todorov

RENOVIGITA E-AGADO


En nia vilaĝo Dălboki, distr. de Stara Zagora per la aktiva helpo de Rajno Ĉipilev, membro de DK, estis renovigita la agado de la E-Societo „Marko Ivanov“. Dek membroj pagis membrokotizon por 1973 j. La societo akceptis planon por sia agado dum la tuta jaro.

Ĉe la societo funkcias E-kurso kun gvidanto R. Ĉipilev. Partoprenas 14 gekursanoj, inter kiuj 4 geinstruistoj.

Koljo Kondov

Dnm 1972/73 lernojaras ĉe la 28-a Unueca Meza Politeknika Lernejo en Sofio funkciis Esperanto-rondo de lernantinoj sub la gvido de Vania Savĉeva, iuistino en la lernejo.

Sur la foto: La lernantinoj partoprenas la uuuamajan manifestacion en Esperante formita bloko, en specialaj uniformoj, kiujn ili mem kudris al si.



CELEBRO DE BULGARA-SOVETA KONTRAKTO

Je la 16 de marto ĉ. j. en Ruse oni solene celebris la 25-an datrevenon de la Kontrakto de Amikeco, Kunlaborado kaj Reciproka Helpo inter Popola Respubliko Bulgario kaj Sovetunio. La entuziasmigita kunveno sendis salutleteron al la esperantistoj en la ĝemela urbo Riga.

La solenan celebron ĉeestis la Esperanto-poeto Asen Grigorov, prezidanto de la Sekcio de la Esperantistoj-Literatoroj en Bulgario. Li helpis la samideanojn en Ruse fondi Literaturan Esperanto-Rondon.

Laŭ Tatjana Radeva
Ĵ, „Dunavska Pravda“, n-ro 68/1973

LA ESPERANTISTOJ EN DRJANOVO ATINGIS BONAĴN REZULTOJN

Ekde 1970 j. E-Societo „Ivan Vladkov“ en Drjanovo disvolvas tre aktivan agadon kaj atingis bonajn rezultojn. La membraro konstante kreskis: en 1970 — 17 membroj, en 1971 — 53, en 1972 — 70 (inter kiuj jam 49 gejunuloj). Ĉi-jare ni strebas al 90 membroj, kaj tio estas tute reala, ĉar en la momento funkcias 3 E-kursoj, kies kursanoj plejparte ne estas societaj membroj. Ni varbis ankaŭ 4 instruistojn, kiuj studas en la 6-monata kurso organizita de la Instruista Sekcio de BEA.

La someron de 1972 ni partoprenis per 20-persona grupo en la internacia turista renkontiĝo en Szeged, Hungario.

En decembro 1972 helpite de la E-societoj en P. Trâmbeș kaj Trojan kune kun la Pac-komitato en la urbo ni organizis imponan E-ekspozicion sub la slogano „La mondo batalas por paco kaj pli feliĉa vivo“. Ĝi estis dediĉita al la 50-jara jubileo de USSR kaj la 113-a naskiĝtago de Zamenhof. La ekspozicio vekis grandan intereson ĉe la urbanaro kaj speciale ĉe la junularo. Jen kiajn pritaksojn oni povas legi en la kajero por impresoj:

„Per tiu ĉi ekspozicio la vizitanto kvazaŭ tra malgranda fenestro povas vidi interesajn

aĵojn el diversaj partoj de la mondo, eksention, kio interesigas la laborulojn en diversa landoj. Estus bone, se oni aranĝus similan ekspozicion ankaŭ estonte.“ (Damjan Ĥristov el la UK de BKP).

Dividante la spertojn de la E-societo en Trojan, ni kreis intimajn ligojn kun la gvidantoj de la entreprenoj en la urbo kaj kun la estraro de la Kulturdomo. Bonan helpon ni ricevis ankaŭ de la Urba Konsilantaro de la Profesiaj Unuiĝoj. Nun ni strebas plilarĝigi niajn rilatojn kun la urbaj estraroj de Kom-somolo kaj Patrolanda Fronto. Ĉio ĉi nepre kaj ĝiam kondukas al sukcesoj en la E-laboro

G. Manev.

RESTARIGITA E-SEKCIO

La Sekcio de la Esperantistoj-Filatelistoj de BEA, kiu dum kelka tempo estis ĉesiginta sian agadon, renovigis ĝin sub la nomo Klubo de l'Esperantistoj-Filatelistoj „Amika Rondo“.

La klubo estas sankciita de la Estraro de Asocio de la Bulgaraj Filatelistoj kaj de la Estraro de Bulgara E-Asocio, sub kies gvido ĝi disvolvos sian agadon.

La celo de la klubo estas: organizi ĉiujn bulgarajn esperantistojn-filatelistojn; propagandi kolektadon de Esperantaj kaj aliaj filatelaj materialoj; kolekti kaj disvastigi informojn, kiuj interesas la membrojn de la Klubo; per reciprokeco helpi la membrojn prepari siajn kolektojn ktp.

La membrado en la klubo estas senkotiza. Antaŭstaras la eldonado de informa bulteno, kiu ankaŭ estos senpaga por la membroj.

Estas elektita nova estraro: prezidanto — Ivan Daskalov el Sofio, sekretario — Ljubomir Leviĉarov el Sofio, dommastro — Dimitr Biĵev el Sofio kaj membroj Asen Stefanov el Varna, Angel Andreev el Nikopol, Ivan Peev el el Ĉirpan kaj Kiril Ĥlebarov el Petriĉ.

La sidejo de la klubo estas je bul. Lenin, blok 107-A, Sofio 13.

L. Leviĉarov

SUBSKRIBITA PROTOKOLO INTER LA KOMITATO DE TURISMO KAJ BEA

La 7-an de aprilo j. k. estis subskribita protokolo inter la Komitato de Turismo ĉe la Ministra Soveto de PR Bulgario kaj la Bulgara E-Asocio pri kunlaborado surbaze de uzado de Esperanto por popularigi Bulgarion kiel landon de internacia turismo.

La Komitato de Turismo devigas sin daŭrigi la eldonadon de la bulteno „Bulgario — Turisma Informado“ ankaŭ en Esperanto, eldoni „Gvidlibron de Sofio“ en 3000 ekz., kaj la broŝuron „Bulgario“ en 4000 ekz., ĝis la fino de 1974 j. doni la nomon „Esperanto“ al iu el la hoteloj ĉe „Slânŝev Brjag“ (Suna Bordo) apud Nigra Maro k. a.

BEA devigas sin informi la Komitaton de Turismo pri la rezultoj de la internacia enketeto pere de la broŝuro „Bulgario“, doni tujan respondon al ĉiuj eksterlandaj organizaĵoj kaj personoj, kiuj interesiĝas pri vojaĝoj al Bulgario, popularigi per „Bulgara Esperantisto“ pitoreskajn ripozlokojn en la lando ktp.

La protokolo estas subskribita de la prezidanto de BEA Nikola Aleksiev kaj la vicprezidanto de la Komitato de Turismo Minĉo Ĉuntov.

JUNULARA E-KONFERENCO SUR VITOŜA

La VII Landa Junulara Esperanto-Konferenco estis okazigita en interesa maniero la 31-an de marto kaj la 1-an de aprilo ĉ. j. Pli ol 90 junaj geesperantistoj — studentoj, lernantoj kaj laboristoj kolektiĝis en montodomo „Edelvejso“ sur monto Vitoŝa. La partoprenantoj venis el sep urboj: Sofio, Plovdiv, Varna, Sviŝtov, Ŝumen, Trojan kaj Ĥaskovo.

Oni atingis la montodomon post unuhora irado. Dum la vespero estis organizita gaja kunestado. La junaj esperantistoj konatiĝis kaj interparolis. En la sekva mateno okazis la konferenco mem. Ĝi estis dediĉita al la 50-jara jubileo de la glora Septembra Ribelo de nia popolo (1923 j.) — la unua kontraŭfaŝisma ribelo en la mondo. Ni aŭdis koncizan prelegon pri tiu temo de la studentino Lora Ĥalaĉeva. Poste ing. Angel Todorov, membro de la estraroj de BEA kaj BEJ, faris sciigojn pri la plej gravaj Esperanto-aranĝoj en la nuna jaro. Post li parolis reprezentantoj de la diversurbaj grupoj. Ili esprimis deziron, ke la junaj bulgaraj esperantistoj renkontiĝu pli ofte kaj altiru novajn junulojn al la Esperanto-movado.

Regis entuziasmo kaj preteco por aktiva Esperanto-laboro.

Nevenka Aleksieva

Metodika konferenco en Smoljan

Laŭ iniciato de la Instruista Sekcio de Bulgara Asocio, la DK en Smoljan helpate de la distrikta fako „Popola Instruado“ organizis metodikan konferencon por la instruistoj de Esperanto en Smoljan-distrikto.

En la fakultativa klaso de la instruistino Maria Diĉeva en IV fundamenta lernejo, kv. Ustovo, modelan lecionon faris Maria Angelova. Lige kun la leciono okazis vigla diskutado, kiun partoprenis Boris Angelov el Smoljan, Emil Ĉirpanski el Dospat, Blaga Despotova kaj Julia Blagoeva el Zlatograd, Darina Todorova el Madan k. a. Ĉiuj esprimis kontenton pri la bone farita leciono, pri la donita ebleco dividi metodikajn spertojn.

Intereson vekis ankaŭ la prelego de Stefan Pavlov, sekretario de la DK en Smoljan je temo „Teknikaj rimedoj ĉe la instruado de Esperanto“.

La diskutantoj subtenis la lektoron, ke estas necesa modernigo de la E-instruado, kaj insistis, ke DK plibonigu la materialan instrubazon, havigante al ĉiuj

La partoprenantoj en la modela leciono



E-societoj en la distrikto teknikajn instruilojn — gramofonojn, magnetofonojn, diagramojn k. s.

La partoprenantoj en la konferenco esprimis deziron pri pli ofta organizado de similaj ekskluzive utilaj metodikaj iniciatoj.

Straŝimir Spasov

NOVA LERNANTA E-SOCIETO

En Plovdiv ekfunkciis nova lernanta E-societo. Ĝin fondis 23 gelernantoj de la 8-a klaso en la lernejo „Duŝo Ĥaĝidekov“, kiuj lernas Esperanton ekde monato decembro 1972 j.

La fonda kunveno okazis je la 18-a de marto. Ĉeestis la vicedirektoro de la lernejo, la prezidanto kaj la sekretario de la DK de BEA, la respondeculo pri la junulara agado ĉe la DK, reprezentanto de la studenta E-societo. La kunvenon malfermis la gvidanto de la E-kurso en la lernejo Nikolaj Karakaŝev. Kun varmaj salutyortoj al la junaj geesperantistoj sin turnis Miĥail Danĉev, prezidanto de la DK. Li parolis ankaŭ pri la organiza strukturo de la bulgara E-movado, pri la celoj de la junulara movado en nia lando.

Estis elektita la jena estraro: Juliana Angelova — prezidantino, Stefan Paunov — sekretario kaj Petja Kinkina — kasistino.

Fani Miĥajlova

CELEBRO DE KOPERNIK

En la kvin Esperanto-grupoj de la Lernanta E-Societo „Anne Frank“ ĉe la Teksa Teknikumo en urbo Vraca estis organizitaj kunvenoj dediĉe al la 500-a datreveno de la naskiĝo de la granda pola astronomo kaj sciencisto Nikolao Kopernik. Pri lia vivo prelegis la E-instruisto Enju Daskalov.

Antaŭ la gelernantoj estis prezentita 8 mm filmo pri Pollando, ellaborita de la Foto-Kino-Klubo ĉe la societo. La fotojn oni faris dum vojaĝo de 80-persona junpionira danctrupa el nia urbo tra Pollando, kiu vizitis Krakov, Os-wiencim, Bjalistok, Varsovion, Helmza, Byd-goszcz kaj Torun.

Estis aranĝita speciala vitrino pri Kopernik en la lernejo.

Veselin Nikolov

Lernanto instruas Esperanton

La lernantoj de Esperanto en la Teksa Teknikumo en u. Vraca jam kutimiĝis al plej diversaj instrumentadoj fare de sia E-instruisto k-do Enjo Daskalov.

Jen nova surprizo: kun klaslibro subbrake en la klasĉambron eniras la lernanto Veselin Nikolov. Li anticipe estis preparinta sin, la antaŭan studhoron ĉeestis ankaŭ la lecionon de sia instruisto en I-„g“ kurso*. Nun li okupis la lokon de sia instruisto en I-„b“ kurso. La lernantoj atente sekvis la lecionon — ilia „kolego“ instruis la akuzativon, unu el la plej malfacilaj punktoj de la E-gramatiko. La hora legado kaj respondado tre kuraĝigis ilin kaj fine de la leciono, ĉe la ĝeneraligo, ili jam povis bone respondi ankaŭ individue.


Post la studhoru okazis pridiskuto de la leciono. Oni pritaksis, ke ĝenerale la leciono pasis bone, kaj ĝia celo estis atingita. Gravaj mankoj kaj eraroj ne estis. Estis rekomendite al la juna instruanto ne stari nur ĉe la nigra tabulo, skribi per iom pli grandaj literoj, akcenti iujn momentojn.

La sekvan tagon V. Nikolov instruis la saman lecionon en tri aliaj klasoj. Ĉiuj hieraŭ faritaj eraroj ne ripetiĝis — tio montris, ke la lernanto bone adaptiĝas al la instrumaniero de sia instruisto.

K-do E. Daskalov deklaris, ke estonte plej bonaj lernantoj ofte okupos lian lokon kaj faros provlecionojn. Tio estas tre interesa kaj utila formo de laboro: la plej bonaj lernantoj „baptiĝas“ en la pedagogia arto, kaj la ceteraj ekhavas novan kuraĝon dum la lernado por atingi la plej bonajn.

Plamen Vačev

* Laŭvice „g“ estas la kvara litero en la bulgara alfabeto.



RENKONTIĜO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ

La Estraro de Klubo „Rodopa Juneco“ kaj la junulara sekcio ĉe la Distrikta E-Komitato en Smoljan organizis la 21-an de aprilo ĉ. j. en restoracio „Sokolica“ vesperon-renkontiĝon je temo „Eperanto, solidareco, paco, amikeco“.

Ĝi estis dediĉita al la X Monda Festivalo de l'Junularo, kiu okazos en Berlino ĉ. j. Ĉeestis pli ol 200 gejunuloj — esperantistoj kaj amikoj de la Internacia Lingvo.

Gastoj de la renkontiĝo estis: Stefan Kudin — unua sekretario de la Urba Komitato de Komsomolo, Fani Miĥajlova — reprezentanto de la E-junularo de Plovdiv, kaj eksterlandaj studentoj, kiuj studas en Bulgario.

K-do Kudin parolis pri la entreprenoj de la urba junkomunista organizaĵo lige kun la X Monda Festivalo de l'Junularo. Li diris, ke antaŭstaras renkontiĝoj kun eksterlandaj studentoj ĉe ni, viktorigoj „Festivala Globo“, junularaj brigadoj, amasaj sportaj manifestiĝoj. K-do Kudin salutis la iniciaton de la junaj esperantistoj — organizi tian belan renkontiĝon, kaj esprimis esperon pri pli oftaj kunaj iniciatoj, pri praktika aplikado de Esperanto.

Stefan Pavlov traegis la leteron de Renato Korsetti el Italio — prezidanto de TEJO, en kiu li donas pozitivan pritakson al la agado de l'esperantistoj de Rodopi-regiono.

La eksterlandaj studentoj esprimis kontenton pro la bone organizita renkontiĝo kaj pro la gastameco de la junularo de Smoljan.

Estrada E-orkestro, gvidata de N. Karagjaurov, kreis agrablan atmosferon.

Oni okazigis ankaŭ du interesajn konkursojn.

En la analoj de la junaj esperantistoj de Smoljan kaj la distrikto enskribiĝis ankoraŭ unu longe memorota emocia vespero-renkontiĝo por la paco kaj la amikeco, por la feliĉo sur la tero.

Maria Dičeva

BONA ESPERANTISTINO — PERFEKTA STUDENTINO — ELSTARA SPORTISTINO

En la Supera Medicina Instituto de Sofio ekde 1972/1973 lernojaru studas nia juna s-anino Mariana Georgieva Dimova el Varna. Pro siaj bonegaj atingoj ŝi estis titolita Majstro de la sporto pri arta gimnastiko.

Dum la tutrespublikaj ludoj en Sofio ŝi gajnis 5 arĝentajn medalojn kaj ordenon „Sporta Gloro“ — II grado. Ludis en Parizo, Prago, Odeso — ĉie kun granda sukceso.

La 3-an de decembro 1972 j. dum la respublikaj studentaj sportaj ludoj ŝi estiĝis ĉampiono je disciplinoj pilko kaj ringo.

Ni kungojas la sukcesojn de nia juna samideanino kaj bondeziras al ŝi novajn, ankoraŭ pli grandajn sukcesojn kaj feliĉon!

Prelego pri Esperanto kaj la scienco

Laŭ iniciato de la Asocio de Sciencistoj, filio de Varna, estis organizita prelego de la konata bulgara sciencisto inĝ. Vasil Peevski, Merita Aganto de la Scienco, je temo „La Scienco kaj la problemoj pri internacia lingvo“. La prelego okazis la 29-an de marto en la moderna salono „Lenin“. Inter la aŭskultantoj estis sciencistoj, civitanoj, esperantistoj. La kunveno gvidis la vicprezidanto de la Asocio de Sciencistoj en Varna docento Georgi Dimov.

Per sia brila kaj science argumentita parolado Peevski konvinkis la aŭskultantojn pri la nepre necesa solvo de la problemoj pri la internacia lingvo, ĉar ordinare en la mondo ĉiujare okazas pli ol 5000 internaciaj kongresoj, konferencoj, simpozioj kaj aliaj renkontoj de sciencistoj. La oficialaj du aŭ tri lingvoj, kelkfoje eĉ nur unu, ĝenas ilin, kaj oni konstatas, ke vigle partoprenas la debatojn nur tiuj sciencistoj, kies gepatra lingvo estas rekonita kiel ofiĉala lingvo de la kongreso aŭ simpozio. La aliaj partoprenantoj sidas, aŭskultas kaj kelkfoje nenion komprenas.

Ordinare, kiam la tradukistoj havas anticipe la tekston de la raportanto, la traduko marŝas bone. Sed kelkfoje la oratoroj deflankiĝas de la anticipe skribita teksto, kaj tiam okazas konfuzoj. La oratoro ĉe la tribuno parolas pri io kroma, kaj la tradukistoj en sia ĉelo tradukas la malnovan tekston. Vere ridinda situacio.

Ĉe la fino de sia prelego prof. Peevski proponis la internacian lingvon Esperanto kiel bonegan solvon de la problemoj. La fakto, ke ĝis nun krom Esperanto estas kreitaj kelkcentoj

da artefaritaj lingvoj signifas, ke la problemoj estas ege gravaj, kaj ĝia solvo urĝa. La konata bulgara sciencisto deklaris, ke Esperanto estas la plej perfekta el ĉiuj lingvoj kreitaj antaŭ aŭ post ĝi.

Post la prelego oni direktis al la preleginto multajn interesajn demandojn, al kiuj li respondis plendetale per la konvinka lingvo de la sciencaj argumentoj.

Laŭ propono de prof. Peevski, kiu estas ankaŭ prezidanto de la sekcio „Esperanto“ ĉe la Asocio de la Sciencistoj en Bulgario, tia sekcio estis fondita ankaŭ en Varna. Kiel ĝia prezidanto estis elektita doc. Georgi Dimov.

La saman tagon antaŭ la prelego prof. Peevski estis intervjuita de ĵurnalisto de Radio Varna. La sekvan tagon la urba radio-reto disaŭdigis la 20-minutan intervjuon. Novaj pli ol 70 000 aŭskultantoj havis la eblecon konatiĝi kun la grava problemoj,

Por la prelego la Asocio de Sciencistoj en Varna eldonis specialan afiŝon, kiu estis disgluita en la tuta urbo. La loka ĵurnalo „Narodno Delo“ en sia n-ro 74 ankaŭ informis pri ĝi. Kaj la fruktoj ne malfruis: laŭ iniciato de la partia organizaĵo ĉe kvartalo „Avram Gaĉev II“, la Kvartala Komitato de la Patrolanda Fronto, la Turingklubo kaj la Distrikta E-Komitato honore al 50-jara datreveno de la glora Septembra Ribelo kaj la 80-jara datreveno de la fondo de l'Komunista Partio en Varna estis malfermita kurso de Esperanto kun gvidanto Georgi Dimov.

G. Dimov

INTERESA INICIATO DE LA ESPERANTISTOJ EN RUSE

Laŭ iniciato de la E-societo „Libero“ en Ruse la membroj de la 11-a organizaĵo de Patrolanda Fronto organizis komunan kunvenon en la klubo sur strato „Esperanto“.

Malfermante la kunvenon la prezidanto de la organizaĵo de Patrolanda Fronto anoncis, ke ĝi estas dediĉita al la Tago de la Kosmonaŭtoj kaj la 56-a datreveno de la morto de l'aŭtoro de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof.

La Sekretario de la E-societo Georgi Dobrev priglorigis la vojon de la kosmonaŭtoj, notante speciale la heroojn de la unua kosmonaŭto — la kosma Kolumbo Jurij Gagarin.

La raportanto rakontis ankaŭ pri la vivo kaj la aferoj de d-ro Zamenhof, kreinto de la plej

facila, vere internacia neŭtrala lingvo, kiu devas fariĝi dua lingvo de l' teraj loĝantoj kaj servi al la paco kaj amikeco inter ili.

La membroj de la Literatura E-Rondo en Ruse legis siajn verkojn. B. Kavalĝiev parolis pri la gramatiko de la lingvo. La komsomolano Enĉo Bratov recitis versaĵojn de Vapcarov kaj Smirnenski en Esperanto. T. Ĥristova recitis siajn versaĵojn „Flugilhavaj gastoj de Septembro“, dediĉitan al la sovetaj kosmonaŭtoj Tereŝkova kaj Bikovski, vizitintaj nian urbon.

La membroj de la Patrolanda Fronto dankis al la esperantistoj, esprimante deziron pri similaj estontaj gastadoj.

T. Radeva, B. Kavalĝiev

KOMUNIKAĴO

Reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj el socialismaj landoj kunvenis la 19-an kaj 20-an de marto en Budapeŝto kaj priparolis problemojn de plua kunlaborado de siaj asocioj por pli efika uzado kaj disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto en la servo de paco kaj socia progreso.

Budapeŝto, la 21-an de marto 1973

NECESA FARO

Observante dum la lastaj jaroj la stagnadon de la E-movado en nia urbo Ruse, mi vidas gravan mankon en nia agado, kiu certe bremsas la varbadon de novaj adeptoj.

La regulaj semajnaj kunvenoj de nia E-societo estas vizitataj de ĉirkaŭ 20 societanoj — la plej maljunaj (pensuloj). Laŭ la akceptita trimonata plano oni prelegas, raportas, diskutas pri diversaj temoj, sed ĉio restas en la fermita kluba rondo. Mankas al ni kontakto kun neesperantista publiko.

Nur aŭtune, post afiŝa reklamo, oni sukcesas komenci kelkajn negrandajn kursojn. Sed ili ofte fiaskas pro defalo de la plimulto, ne atinginte la finon de la lernoprogramo.

Do, estas videble, ke la ĝisnuna maniero de varbado jam fiaskis. Ĝi malnoviĝis.

Kio necesas por transiri al pli intensa, pli moderna propagando? Tiu-cele mi konvinkiĝis, ke estas necesaj regulaj, pli oftaj kontaktoj kun la neesperantista publiko. Monate ni ekzemple havas 4 semajnajn kunvenojn (kutime merkrede, de la 18.30 ĝis la 20 horo). Mi opinias, ke almenaŭ 1 fojon monate ni devas anonci publikan kunvenon nur en bulgara lingvo, invitante interesulojn inter la urbanoj, la lernanta

kaj alia junularo aŭskulti prelegojn pri la internacia lingvo Esperanto, kial, kiel kaj kie oni povas lerni ĝin ktp. Post la prelego kaj interesigaj novaĵoj sekvu demonstraĵa gramatika leciono, por ke oni vidu kiel bele sonas nia lingvo, kiel simpla estas ĝi. Sendube per majstra klarigo ni sukcesos interesigi iujn kaj gajni ilin por la Movado. Alivorte, necesas konstanta semado. Mem Zamenhof diris: „Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas — ni semas kaj semas konstante“.

Mi mem dum miaj personaj kontaktoj kun neesperantista publiko komprenis bone, ke necesas, necesegas klarigoj pri la lingvo kaj ĝia gramatiko, pri ĝiaj celoj kaj rolo. Mi konstatis, ke oni admiras la simplecon de la gramatiko de Esperanto, ĝian internacian vortaron, la forigon de diversaj balastoj, la ŝparon de tempo ĉe ĝia lernado ktp.

Per nia asocia organo mi kuraĝas proponi mian rekomendon al ĉiuj aktivuloj kaj Esperanto-societoj, kie la Movado stagnas.

Boris Kavalĝiev
E-veterano

Noto de la Redakcio. Donante lokon al la artikolo de k-do Kavalĝiev, ni petas, ke ankaŭ aliaj kamaradoj diru sian opinion pri la starigita grava demando, dividu spertojn, faru utilajn rekomendojn por aktivigi kaj rezultigi nian E-laboron. Ĉiuj interesaj kaj valoraj opinioj aperos en nia gazeto, en la rubriko „Ni rezultigu nian E-laboron“.

AKTIVIGO DE LA E-AGADO EN LA INTERNACIA TURISMO

Sendube Esperanto havas plej grandajn ŝancojn rapide penetri en la internacian turismon ol en kiu ajn alian kampon.

Monda Esperanto-Turismo lanĉas kampanjon por vasta propagando kaj apliko de Esperanto en la internacia turismo. La kampanjo daŭros de la 1973 ĝis la 1980. Al la sukceso de la kampanjo povas kontribui ĉiuj organizaĵoj kaj personoj.

Por akceli la propagandon kaj la uzadon de Esperanto en la turismo, Monda E-Turismo eldonos diversajn propagandilojn: flugfolion, prospekton, glumarkojn, etikedojn, poŝtkartojn, kalendaron, afiŝojn, varbilojn.

Por helpi la internaciajn vojaĝojn de la esperantistoj la Asocio starigos en landoj, kie estas kondiĉoj por tio, oficejojn aŭ servojn „Esperanto-Turismo“. Ili organizos interesajn, mal-

multekostajn ekskursojn. Por tiu celo estis starigita fonduso „Aŭtobusa Esperanto-Turismo“. Por doni al la interesuloj ampleksan informadon pri la E-eventoj: vojaĝoj, renkontoj, festivaloj, seminarioj, kongresoj k. a., Monda Esperanto-Turismo en kunlaboro kun interesuloj ĉiujare eldonos libron „Esperanto-Turismo kaj Vojaĝado“.

En landoj, kie estas minimume 10 asociaj membroj, oni devas starigi landajn sekciojn.

La novaj membrokotizoj de Monda E-Turismo estas:

a) Individua membro pagas aliĝkotizon 0,50 usonajn dolarojn kaj por ĉiu

trijara periodo po 1,50 dolaroj.

b) Kolektivaj membroj povas esti nur organizaĵoj. Por ĉiu trijara periodo por ĉiu sia membro ili pagas po 0,03 dolaroj. La kotizoj kaj la kontribuajoj al la fonduso „Aŭtobusa E-Turismo“ estas pagataj per landa valuto.

Se vi deziras ricevi pliajn informojn pri Monda Esperanto-Turismo aŭ vi volas ion sugesti aŭ kontribui por la sukceso de Esperanto en la sfero de la internacia turismo, bonvolu vin turni al la ĝenerala sekretario: Nikola Nikolov, P. K. 45, Sofio C, Bulgario.

N. N.

TRA LA E★ MONDO

LA 18-a TUTPOLLANDA ESPERANTO-KONGRESO

De la 24-a ĝis la 26-a de aprilo kunsidis al 18-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso. Ĝi okazis en la konata kuraĉloko Sopot, ĉe la Balta Maro.

Al la Kongreso aliĝis ĉ. 420 geesperantistoj el la tuta lando.

En la prezidantaro de la solena malferma kongreskunsido ĉeestis la vic-prezidanto de la Pola Parlamento (Sejmo) Andrzej Benesz — prezidanto de la Demokratia Partio. Ĉeestis ankaŭ Stanislaw Legutcki — I-a sekretario de la Urba Komitato de Pola Unuiĝinta Laborista Partio en Sopot, la estro de la kultur-fako de la Urba Soveto de Sopot, kaj speciala reprezentanto de Polaj Aer-Linioj „LOT“, kiuj eldonas esperantlingvan bultenon „Informa Servo de LOT“.

La kongresanoj aŭdis tre interesan prelegon je la temo „Jaro de la Pola Scienco“ de la direktoro de la Politekniko en urbo Gdansk.

Ĉiuj kongresanoj kaj eksterlandaj gastoj vizitis la lokon, kie komenciĝis la Dua mondmilito — Westerplatte. La plenmano da polaj soldatoj heroe batalis kontraŭ la multnombra hitlerana militista trupo. Eĉ la mialnobla malamiko devis rekonii la heroecon de la polaj patriotoj. Nun sur tiu historia loko, sanktejo por la pola popolo, troviĝas impona monumento, kiu tre elokvente prezentas la

MULTNOMBRA RENKONTIĜO DE SOVETAJ ESPERANTISTOJ

En Ufa okazis la 7-a Renkontiĝo de Esperantistoj de Volgo-Uralo (REVU-7) kun partopreno de 150 personoj el 30 urboj kaj distriktoj.

En la programo: diskutoj pri aktualaj problemoj de soveta junulara Esperanto-movado, studado de novaj kantoj, lingvaj konsultoj, partopreno en unuamaja manifestacio, komuna tagmanĝo, ekskursoj, vizito de spektaklo en cirko, koncerto. Inter la partoprenantoj estis distribuataj kantaroj „Kantas uralaj esperantistoj“ kun 70 eroj.

Boris Kolker

Post la unua E-konferenco en Krasnodar (USSR), kiun partoprenis ankaŭ esperantistoj el Soĉi, Tuabse, Novosibirsk k. a.



historian eventon. Vico da dokumentaj fotoj kun klarigaj tekstoj en kelkaj lingvoj prezentas la faktojn ĉirkaŭ tiu militoperacio, per kiu Hitler komencis la militiron kontraŭ Pollando, tiom suferinta sub la kruelega faŝista okupanto.

La sekvantan tagon oni aŭdis la referaĵon „50 jarojn polaj Esperanto-kongresoj“ de la konata al la bulgara esperantistaro pola E-veterano Jan Zawada. En ĝi troviĝas multaj interesaj faktoj pri tiuj plej elstaraj Esperanto-aranĝoj en la vivo de la pola Esperanto-movado.

Ĉiuj kongresanoj poste dividiĝis en kvar komisionojn, kie en afereca atmosfero estis traktataj ĉiuj problemoj de la landa movado. La trian tagon en plenkunsido de la Kongreso la prezidantoj de la koncernaj komisionoj faris koncizajn raportojn pri la traktitaj problemoj kaj la aprobitaj rekomendoj.

Vespere la duan tagon en luksa salono okazis la kongresa balo, kiu pasis en amika etoso, tre interese kaj intime, kun alloga programo. La esperantistaro ankoraŭfoje pruvigis, ke ĝi scipovas labori kaj ankaŭ kulture amuziĝi.

La konkluda plenkunsido aprobis rezolucion kun rekomendoj al la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio.

Krom tiuj gravaj momentoj en la kongresa laboro estis ankaŭ aliaj eroj de la programo de LKK: Esperantaj filmoj, gazetar-konferenco, ekspozicio de esperantaĵoj, filatela ekspozicio k. a. Tre interesa estis la ekskurso, organizita post la fino de la kongres-kunsidoj al la fama mezepoka fortikaĵo en u. Malborka. Nun tie estas farataj rekonstruaj laboroj, sed tamen funkcias ankaŭ du muzeoj kun vidindaĵoj el tiu epoko.

La Kongreson partoprenis delegitaroj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR kaj Hungario, gvidataj de plej respondecaj reprezentantoj de la koncernaj Esperanto-Asocioj.

Ĉiuj ricevis la eblecon dum la solena malferma kunsido saluti la kongresanojn kaj bondeziri al ili sukcesplenan laboron.

Mi salutis je la nomo de Bulgara Esperanto-Asocio kaj de Mondpaca Esperantista Movado.

Interalie mi diris:

„Viajn sukcesojn ni sentas kiel sukcesojn de la Esperanto-movado en ĉiuj socialismaj landoj kaj ankaŭ kiel gravan kontribuon en la evoluo de la tutmonda Esperanto-movado. Des pli, ke vi havas honoran lokon en la internaciaj Esperanto-medioj kiel naskiĝlando de la Internacia Lingvo Esperanto, lando, kiu donis al la mondo la rimarkindan figuron de d-ro Zamenhof, rekonita de UNESKO kaj de la Tutmonda Packonsilantaro kiel unu el la elstaraj personecoj de la tutmonda kultura historio.

Ni estas aparte feliĉaj, ke la naskiĝlando de d-ro Zamenhof estas hodiaŭ unu el la plej aŭtoritataj ŝtatoj kiel en la socialisma tendaro, tiel ankaŭ en la tuta mondo. Al vi kaj al socialisma Pollando ni deziras grandegajn atingaĵojn en ĉiuj sferoj de la vivo kaj precipe en la batalo por paca evoluo de la homaro. Jam tro longe kaj multe suferis la pola popolo pro teruraj militoj kaj fremda jugo! Tial neniue dubas en la pacamo de la poloj kaj de ilia socialisma ŝtato.“

En la ferma kunsido la delegitaroj de la centraj Esperanto-asocioj proponis al mi fari mallongan paroladon je la nomo de ĉiuj delegitaroj. La kongresanoj aplaŭde renkontis la salutvortojn de la frataj Esperanto-asocioj.

Nia ĉeesto en la 18-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso fortikigis la solidarecon de la esperantistaro. Ni estas konvinkitaj, ke niaj ligoj fariĝos pli firmaj.

La kongreso, sendube, kreos pli favoran atmosferon por plua fruktodona agado de la pola esperantistaro.

*N. Aleksiev
prezidanto de BEA kaj MEM*

LA POLAJ AERTRAFIKAJ LINIOJ LOT*

La Polaj Aertrafikaj Linioj LOT apartenas al la plej malnovaj aertransportantoj en la mondo. Formale LOT ekzistas de post 1929 j., tamen jam ekde 1925 j. funkciis entrepreno, kiu estis la senpera antaŭulo de LOT.

Valoras rigardi en malnovajn analojn kaj rememorigi ankaŭ majon de 1933. La eminenta

** Kun mallongigoj.*

PARTOPRENU AMASE FINNLANDAN ESPERANTO-KAMPANJON!

Jam trian fojon la esperantistoj el multaj landoj „partoprenos“ la feston de la „Urb otago de Turku“. Turku estas la plej malnova historia havenurbo en Sudokcidenta Finnlando. La esperantistoj el ĉiuj landoj estas petataj sendi bildkartojn de pupoj el sia lando. La urbo lotumos inter la kartoj 10 belajn pupojn en historia vestaĵo.

Do, sendu bildkartojn de pupoj ĝis la 15 de septembro ĉ. j.!

Adreso: La Tago de Turku, Box 66, SF 20100 TURKU 10, Finnlando.

Sur la bk devas esti klariga teksto en Esperanto. Ne forgesu noti ankaŭ vian nomon kaj adrdson!

aviadisto Skarzynski solece transflugis tiam Atlantikon. Li uzis la polan aviadilon RWD-5, adaptitan por flugo super Atlantiko.

RWD-5 bis enskribiĝis en la historion de la aviado kiel unu el la plej malgrandaj aviadiloj, kiuj iam ajn transflugis Atlantikon. La trakon el St. Louis en Senegalo al Mecele en Brazilo, kiu egalas al 3640 kilometroj, Skarzynski trapasis en la daŭro de 20 horoj kaj 30 minutoj. Li forlasis la aviadilon vestita en ordinara kostumo kaj kun ĉapelo kaj deklaris al la miregantaj rigardantoj, ke la pola aviadlio estas tiel bona kaj oportuna, ke oni povas flugi en ĝi kvazaŭ oni irus promenadi. . .

Multo ŝanĝiĝis de post tiu tempo, kaj la kruela milito detruis la atingojn de multaj generacioj de la poloj.

Post la reakiro de la sendependeco LOT komencis laŭvorte de la komenco mem. Anoncis sin dissemiĝantaj tra la mondo aviadistoj. La personaron de LOT formis grandparte eksaj milit-aviadistoj, kiuj batalante sur diversaj frontoj glorigis la polajn standardojn.

Post la funkciigo de la enlanda trafiko kreiĝis la unuaj eksterlandaj linioj, kies reto sisteme kreskis. Nun ĝi ĉirkaŭprenas pli ol 40 000 kilometrojn.

En 1972 j. la totala laboro de LOT proksimigis la polan transporton al la landoj, kiuj komencas gravi en la mondaj aertrafikaj statistikoj. Pollando en 1972 j. atingis la plej altan nivelon de kresko de la aertransportoj. Valoras rememorigi, ke en 1972 j. la totala kresko de la aertransportoj de la mondo egalas al 7%, de la eŭropa — al 9 %, de la landoj de la Konsilantaro por Reciproka Ekonomia Helpe — al 11%, kaj de Pollando al 19%

INTERESO AL ESPERANTO EN RUMANIO

En urbo Székelyudvarhely (Sekejudvarhej). Rumanio, denove funkcias Esperanto-kurso. Nun en la kadro de Klubo Siculus (Sikulus) kun bona rezulto 15—20 personoj regule vizitas la interesajn lecionojn. Inter ili estas ankaŭ la klubestro s-ro Vas, kiu tre diligente studas la lingvon kune kun la aliaj komencantoj kaj progresintoj. La agado estas vigla kaj fruktodona, ĉar la instrumentoj estas tre interesaj kaj variaj. Kursgvidantoj estas Laszlo Kustan kaj prof. Ludoviko Fülöp.

La gekursanoj deziras korespondi kun esperantistoj el ĉiuj landoj. Skribu al komuna adreso: Clubul Tineretului Siculus, Odorheiu Secuiesc, Rumanio.

Kobina

Tre feliĉaj estas Melinda (4-jara) kaj Andraș (7-jara) Nagy Bilous el Odorheiu, Rumanio: ili gajnis premion pro siaj interesaj kostumoj kun E-ornamaĵoj.

Efektive nia lando havas multajn altklasajn kulturajn kaj artajn centrojn. Jen la malnova ĉefurbo Krakovo, kiu — kun la dominanta super Vistulo kastelaltaĵo Vavelo, multaj preĝejoj, urboplaco kun la draphaloj, fama „barbakano“, universitato el la XIV jarcento — formas neforgeseblan tuton. Jen la varsovia malnovurba kvartalo, kiu, detruita de la germanaj faŝistoj dum la milito, nun estas komplete kaj samtempe ĝuste rekonstruita kun siaj monumentoj, kortuŝe atestantaj pri la vivanteco de nia nacio. Pollando proponas ankaŭ naturajn riĉaĵojn: la tre belan regionon de la lagoriĉa Mazurio, la montarajn regionojn de Karpatoj kaj Sudetoj, la bordon de Balta Maro k. a. . .

Multaj gazetoj kaj revuoj en la tuta mondo kun rekono kaj simpatio notis la fakton, ke LOT estas la unua aertrafika entrepreno en la mondo, kiu utiligas la internacian lingvon Esperanto.

Profitante la okazon ni permesas al ni turniĝi ankaŭ al vi, estimataj legantoj, kun la demando — kiajn eblojn vi vidas por plivastigo de la informado pri la servoj de LOT en via lando, kun speciala konsidero al la esperantista medio. Ni deziras certigi vin, ke la aŭtoroj de la plej interesaj eldiroj ricevos atrakciajn suvenirojn.

*El „Informa servo de LOT“
Esperantlingva eldonaĵo de Polaj Aertrafika
Linioj LOT,
tr. Grójecka 17, Varsovio, Pollando (tel. 22-40-73)*



LA JARKUNVENO DE HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO

La 17-an kaj 18-an de marto okazis la jarkunveno de HEA, kiu pritraktis la ĝisnunan agadon kaj elektis novan Estraron por la sekvanta periodo.

Kiel ĉefsekretario de HEA estis reelektita k-do Bela Bercei, aŭtoritata kaj sperta esperantisto, konata ne nur en Hungara Popola Respubliko, sed ankaŭ en la medioj de la internacia Esperanto-movado, de hungara Esperanto-movado.

Ni salutas la novan Estraron de HEA kaj bondeziras al ĝi pluajn sukcesojn en la disvastigo kaj utiligo de la Internacia Lingvo por la celoj de la tutmonda paco kaj amikeco inter la popoloj.

La jarkunvenon salutis vico da delegitoj el socialismaj landoj. En la nomo de la bulgara esperantistaro tralegis saluton la prezidanto de BEA Nikola Aleksiev kaj transdonis donace grandan albumon kun fotoj el la vivo kaj agado de Georgi Dimitrov.

„BE“

Malfermo de E-infanĝardeno

Laŭ iniciato de la Budapeŝta Teritoria Komitato la 17-an de marto malfermiĝis infanĝardeno en la centra ejo de Hungara Esperanto-Asocio. Ĉeestis 12 infanetoj sub la gvido de s-ino Eva Tóth kaj Irén Bagy. Ili estas ne nur spertaj edukistinoj, sed ankaŭ eminentaj parolantaj esperantistinoj. La infanĝardeno funkcios ĉiusabate, kaj ĝia celo estas la alkiutimigo de niaj infanoj al la ĉiama, rekta Esperanto-parolado.

La unua tago bonege sukcesis. Ĉiuj etuloj fartis bone, ludis, kantis, babiladis Esperante kaj ĉe la adiaŭo diris: „Kiam estos denove renkontiĝo?“

Mi pensas, ke la nun realiĝinta ideo estos granda servo al nia Movado.

Ĝis nun ni jam aranĝis kutime Denaskajn Renkontiĝojn en ĉiuj kvaronjaroj, sed ili estos komencaj de la afero. De nun niaj infanetoj havos pli da okazoj esti kune, praktiki nian lingvon en ĉiutaga vivo kaj fariĝi vere denaskaj esperantistoj.

Aleksandro Péter

El „Budapeŝta Informilo“, n-ro 4/1973

INTERVJUO DE GISELA RELLER KUN KONSTANTIN GUSEV

Kiel niaj legantoj scias, la granda ilustrita semajna revuo de GDR „Freie Welt“ en sia n-ro 50 de la 2-a de decembro 1972 dediĉis 4 grandformatajn paĝojn al intervjuo de sia redaktoro Gisela Reller kun Detlev Blanke — sekretario de Centra Laborrondo Esperanto de GDR. Ni jam donis parton de tiu ĉi intervjuo en n-ro 3 de nia gazeto (vidu p. 11–13).

En „Freie Welt“ la menciita intervjuo estis akompanita de intervjuo de la sama redaktoro kun la elstara sovetia Esperanto-poeto Konstantin Gusev. Ĉi-sube ni donas ĝin la tuta.

Konstantin Mihajloviĉ Gusev surmondas jam ses jardekojn, kvardekojn de tio kiel esperantisto, ekde du jardekoj „Pravda“-redaktoro. Dum longa tempo li estis anstataŭanto de la prezidanto de Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj. Antaŭ nelonge li prizorgis la Esperantan tradukon de poeziaĵo de Jevtuŝenko pri Vjetnamio.

— Bonvolu rakonti iomete pri vi kiel esperantisto.

— Kie komenci, kie ĉesi? Mi estis tute juna homo, kiam mi lernis Esperanton. Vere, efektive pro scivolemo. Mi volis scii, kio estas interesa en tiu lingvo. Nu jes, montriĝis, ke ĉio estas interesa. Kiam en 1936 mi petis permeson iri al Hispanio, oni rifuzis pro mia sanstato. Tamen mi iris, nome al la redakcio de la ĵurnalo de la internaciaj

brigadoj. Tie mi publikigis la unuan tradukitan poeziaĵon en Esperanto. La poemo estis de viro, kiun mi poste tre ŝatis kaj respektis: Ludwig Renn (Ren).

— Ĉu vi en tridekaj jaroj havis kontaktojn kun germanaj laboristoj?

— Jes, en tiu tempo mi estis en Voroneĵ. Ni havis tre ampleksan korespondadon kun germanaj laboristoj. Ni eksciis de ili, kiel ili vivas, pri kio ili pensas, revas, kaj ni rakontis al ili en nia komuna lingvo, kion ni pensas, pri kio ni revas. Multon mi forgesis, sed jeno estas neforgesebla: kiam la milito finiĝis, kaj ni, kompreneble, multajn jarojn nenion aŭdis pri niaj germanaj amikoj, ili sendis al Voroneĵ la standardon, kiun ni antaŭ la milito donacis al ili. Ĉiu el ni sentis emocion.

— Pro kio vi opinias Esperanton tiel eksterordinare grava?

(Sekvas sur paĝo 24)

ESPERANTO EN POPULAR-SCIENCA LIBRO

Antaŭ nelonge en bulgara lingvo aperis la popular-sciencia libro „La fiziko en nia ĉiutageco“ de la franca aŭtoro E. Ajsberg. Eldono de la ŝtata libroeldonejo „Tehnika“, Sofio, en 10 075 ekz. Je la fino de la libro la aŭtoro esprimas sian rilaton al la internacia lingvo Esperanto, kiun ni transdonas ĉi-sube.*

Dank' al la rimedoj, kiujn la tekniko proponas al la homoj el diversaj landoj, ili eniras ĉiam pli ofte en kontaktojn inter si. Sed anstataŭ malŝpari sian tempon, provante senutile lerni grandan nombron de lingvoj ili faros pli bone akcepti iun helpan lingvon, neŭtralan, facilan kaj precizan. Utiligante sian nacian lingvon por komunikiĝi kun siaj samlandanoj, ili povos servi al si per la helpa lingvo por interparoli kun eksterlandanoj. Ne temas pri tio, ke por tiu ĉi celo oni elektu la lingvon de unu nacio, kiu donos al ĝi veran intelektan kaj ekonomian hegemonion. La helpa internacia lingvo devas esti sintezo de la diversaj naciaj lingvoj. Tia lingvo estas Esperanto.

Esperanto estas lernebla pli facile ol kiu ajn nacia lingvo. Ĝi sonas agrable kaj permesas

esti esprimataj ĉiuj nuancoj de la penso dank' al sia riĉa vortaro, konsistanta el limigita nombro de radikoj, sed kun perfekta sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj. Tio ĉi faras ĝin treege oportuna por uzado en la sfero de la scienco kaj tekniko.

Se ĉiuj popoloj povas koni sin pli bone kaj interkompreniĝi pli bone per la helpo de la radio, televizio kaj unu komuna lingvo, ili ŝatos sin kaj amos sin reciproke. Tio ĉi estos, mi esperas, la fino de la plagoj, kiaj estas la militoj. La pli progresintaj nacioj helpas la postrestantajn, kaj la malsato malaperos el la mondo. Mi volas kredi, ke la progreso en la scienco, anstataŭ krei novajn rimedojn por detruo, servos por starigo de justeco, paco kaj amo sur la tero.

* En la franca: E. AISBERG, *La physique dans la quotidienne*.

„JUNULARO“

magazino el Germana Demokratia Respubliko

eldonita de „Verlag Zeit im Bild“, DDR — 801 Dresden, luksa, riĉe ilustrita, 62-paĝa.



de GDR. Gastiganto de la Tutmonda Junularo estas la junularo de GDR.

Sur la paĝoj de „Junularo“ oni prezentas kelkajn el tiuj junaj gastigantoj de 1973. Oni rakontas pri la cirkonstancoj, en kiuj ili vivas kaj laboras, lernas kaj revas, realigante siajn revojn sub la gvido de la laborista klaso kaj ĝia unuiginta marksisma-leninisma partio. La Germana Demokratia Respubliko estas lando kie estas loko por ludo kaj sporto, por muziko kaj dancoj, por feliĉa vivo kaj libera kreado de ĉiuj junaj homoj. Sed tio precipe estas, lando de l' amikeco, de l' solidareco kaj de la batalo por paco.

Kun intereso kaj plezuro oni foliumas la libron „Junularo“, trovante riĉan diverskarakterizan materialon — informojn, skizojn, eldirojn de opinioj, enketojn, poezion ktp. Ĝia aperigo estas bona akiro por la libera germana junularo, kies parto estas ankaŭ la junaj germanaj esperantistoj.

La X Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentoj okazos ĉi jare en Berlino — ĉefurbo

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

Todorka Penčeva (Sofio). *Mi deziras memstare plibonigi miajn Esperanto-lingvokononjn. Kiun lernolibron vi rekomendus al mi?*

— Por memstara lernado de Esperanto, same kiel por lernado en kursoj por progresintaj esperantistoj, plej konvena lernolibro vendata nun en la magazenoj de Bulgara Esperantista Koooperativo, estas „La Tuta Esperanto“ de Henrik Seppik.

Nikola Najdenov (Târnovo). *Kiom da poŝtmarkoj pri Esperanto aperis en Bulgario?*

— En Bulgario ĝis nun aperis kvar poŝtmarkoj pri Esperanto: en 1947 j. — okaze de la 30-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj; en 1957 j. — okaze de la 50-a datreveno de Bulgara Esperantista Asocio kaj la 70-a datreveno de Esperanto; en 1959 — okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof kaj en 1963 — okaze de la 48-a UK de Esperanto en Sofio.

Pri filatelaj demandoj oni povas sin turni al la Klubo de la Filatelistoj-Esperantistoj „Amika Rondo“, bul. Lenin, bl. 107-A, Sofio 13.

Respondas: N. Nikolov

Noto de la Redakcio. *Sur la paĝoj de „BE“ ni donos respondojn al demandoj, kiujn niaj abonantoj direktas al ni, kondiĉe ke la demandoj estas interesaj por multaj niaj legantoj. Oni povas starigi ĉiajn demandojn lige kun Esperanto (lingvo, historio, literaturo) kaj la ĉiuflankaj aktivecoj de nia Movado (organizaj, propagandaj, kulturklerigaj ktp.).*

— Ĉar ni estas por la paco, por la amikeco kun ĉiuj popoloj, havantaj bonan volon. Por tio estas bezonata taŭga interkompreniga lingvo. Esperanto estas lingvo, kies taŭgecon mi

LINGVAJ DEMANDOJ

PRI LA STILO DE LA TEKSTOJ EN ESPERANTO

La artikolo de samideano A. Lienhardt „Pledo por Esperanto laŭeble simpla kaj facile komprenebla“ („Bulgara Esperantisto“ n-ro 1, 1973) estas verkita tiel prudente, ke estus malsaĝe oponi al ĝi. Tamen fakte la aŭtoro pledas ne por Esperanto, sed por „malaltaj kaj mezaj socitavoloj ĉiulandaj“, kiuj lernas aŭ lernis Esperanton. Kaj oni povas senrezerve konsenti, ke la tekstoj en Esperanto, direktitaj al tiuj ĉi tavoloj, devas obei al la rekomendoj de s-no Lienhardt. Des pli, ke ĝuste tiaj tavoloj formas la plimulton de la esperantistaro.

Tamen oni devas havi kompaton al la malplimulto kaj ne esti tro malaprobema, se intelekta elito uzas en siaj verkoj pli rafinitan lingvon. „Homo de la strato“, „griza homo“, kia estas mi mem, rajtas simple ne legi komplikajojn. Ja oni ne forgesu, ke Esperanto estas „vivanta lingvo de vivanta popolo“. Kaj ĉiu fenomeno, okazanta en la lingvo de iu nacia popolo, okazas ankaŭ en la esperantista medio. Ekzemple mi estas certa, ke en Anglio iu „man in the street“ (homo de la strato), trafoluminte verkon de James Joyce (Ĝejms Ĝois), konstruitan sur supersubtila (ĉu?) psikoanalizo, levas la brovojn kaj formetas la verkon. La nuna angla reĝino nomis angla „poeto laŭreato“ s-ron John Betjeman, (Ĝon Betman), kiu verkas poemojn kompreneblajn por ordinaraĵoj ho-

povas jesi ekde 40 jaroj. Cetere, la esperantistoj en via respubliko faras eksterordinare bonan laboron en la mondpaca movado.

moj. Almenaŭ ĉi-okaze ŝi aŭskultis „vox populi“. Do, se eĉ la angla reĝino atentis al la voĉo de la popolo, des pli niaj verkistoj kaj redaktoroj devas memori pri la lingva kapableco de l'esperantistoj en ilia amaso.

Sed ekzistas, ekzemple, franca lingvo de iu supermoderna poeto-abrakadabristo (S-no Lienhardt, pardonu al mi tiun ĉi neologismon!). Same ekzistas Esperanto de ordinaraĵoj, Esperanto de sciencistoj, Esperanto de poetoj-abrakadabristoj. La moderna vivo estas ege komplika.

Praktike: uzu la Zamenhofan stilon de la tekstoj en Esperanto, se vi deziras diri ion al pli vasta medio de esperantistoj. Aliflanke, ĉiu esperantisto memoru, ke Esperanto estas bonega

instrumento por plivastigo de ĉies mensa horizonto. Por tio estas necese posedi bone la lingvon. Por tio estas necese legi pli malfacilajn tekstojn. Por tio estas necese havi Plenan Ilustritan Vortaron, redaktitan de prof. G. Waringhien, eĉ se por ĝia aĉeto estus necese oferi parton de la doto de sia edzino (rememoru pri Zamenhof!) aŭ ĉesi fumi kaj trinki alkoholaĵojn.

Mi esperas, ke mi skribis la supran tekston en komprenebla Esperanto.

R. SIKORSKI

lektoro de matematiko en Pedagogia Instituto
ul. Dolgireva 60, kv. 31, OMSK 33, USSR

Noto de la Redakcio. Ni publikigos ankaŭ aliajn opiniojn lige kun la artikolo de s-ano A. Lienhardt.

la 12-an de februaro 1973, Sofio

Estimata Redakcio,

Dum ĉi tiu lasta tago de nia tre agrabla vizito en via lando, ni volas skribi al vi, por ke niaj dankoj kaj bondeziroj atingu ĉiujn viajn legantojn. Ĉiu de la multaj bulgaraj esperantistoj, kiujn ni renkontis, estis tre gastama, kaj ne eblas aparte skribi al ĉiu. Ni ege dankas vin ĉiujn.

Neniam ni forgesos la belan Sofion kun ĝiaj arboj, parkoj, puraj stratoj sen amasoj de aŭtomobiloj, kun ĝiaj altkulturaj operoj kaj baletoj, kiujn ni vidis. Kaj la interesan Rodopi-montaron — la belegan Pamporovo'n, la plej ŝatindan vilaĝon Ŝiroka Lâka kaj urbon Smoljan kun ĝia bela kaj eduka Etnografia

El la Esperantaj leteroj

Al la Redakcio de „Bulgara Esperantisto“

Muzeo. Kaj la preskaŭ nekredeblan gastameco de la gesamideanoj de Ruse; ŝajnas al ni, kni konis ilin dum nia tuta vivo. e

Sed eble tio, kio plej multe imponis nin, estas la grandeco kaj vigleco de la bulgara Esperanto-movado. Vere impona! Ni esperas, ke iutage la usona E-movado sekvos vian gvidadon.

Ni invitas ĉiun bulgaran esperantiston gastigi al ni en Alaska, kiam ajn eblas.


Ĝis revido, kiam ni revenos!

Jack kaj Sally Lesh

Usono

LA PENTRISTO SIMEON ĈIRPANLIEV

Nia samideano Simeon Ĉirpanliev naskiĝis en vilaĝo Ŝipka, distrikto de Stara Zagora, en 1905 j. Li studis en la pedagogia lernejo en Kazanlâk kaj dediĉis sin al instruista laboro. Li estis instruisto en diversaj partoj de nia patrolando — en la distriktoj de Burgas, Varna kaj Târnovo, en urbo Slivnica, vilaĝo Kalotina, en Rodopi-montaro kaj Sofio — 36 jarojn li instruas la infanojn de la popolo. Ĉie kiel instruisto li portas sian koron de pentristo kaj sian paletron. Kune kun sia laboro kiel instruisto



*Lige kun la Tago de la Bulgara
Kulturo — la 24 de majo*

*KIEL NASKIĜIS LA HIMNO
PRI KIRIL KAJ METODIJ*

1901 jaro.

La lernantoj en nia lando preparas sin por la solena festo de la bulgara kulturo — la Tago de Kiril kaj Metodij. Por tiu ĉi tutpopola festo preparas sin ankaŭ la lernantoj en unuagrada lernejo de urbo Loveĉ, kie instruas muzikon la komponisto Panajot Pipkov (1871—1942). Kelkajn tagojn antaŭ la festo, en studhorro de muziko, Pipkov subite ĉesas sian laboron kun la lernantoj, desegnas rapide liniaron sur la nigran tabulon, kaj sur ĝi tuj aperas notoj, notoj. . .

Atentema lernanto alkuras, donas alian pecon da kreto al la amata instruisto, kaj li desegnas duan, trian liniaron. . . La instruisto ŝajne rimarkas nenion: paliĝinta, li rapide skribas sur la liniaro la ĵus eksoninta en lia kapo melodion de la himno pri Kiril kaj Metodij laŭ teksto de Stojan Mihajlovski. . .

Post duonhorro la instruisto diras al la lernantoj:

— Tralegu!

Kaj la lernantoj komencas legi unue a tekston:

Al hela estonteco iru,
renaskiĝinta vi, popol' . . .

Per emociiĝinta voĉo la instruisto ekkantas la melodion. Poste li ripetas ĝin, ankaŭ la lernantoj. Unue timeme kaj necerte, poste pli kuraĝe kaj flue laŭtigas iliaj voĉetoj. . . La studhorro estas jam finita, sed ili kantas, kantas! Antaŭ la malfermita pordo de la ĉambro estas amasiĝintaj lernantoj el aliaj klasoj kaj kun brilantaj vizaĝoj atente aŭskultas la ĝis nun neaŭditan kanton. Iom post iom ankaŭ ili mem komencas kanti la novan himnon. . .

La saman tagon la nova kanto surverŝas la tutan unuagradan lernejon de Loveĉ. Poste ĝi elflugas el ĝiaj klasĉambroj por trovi lokon en ĉiu bulgara koro, por resti tie eterne. . .

Jonko Korkinov

i ankaŭ trovas tempon por respeguli en siaj bildoj la belecon de la patrolanda pejzaĝo. En la unuaj jaroj de lia laboro kiel pentristo helpanto al li estis lia instruisto en la pedagogia lernejo, la eminenta verkisto kaj pentristo Ĉudomir.

Simeon Ĉirpanliev kreis ĉirkaŭ ducent bildojn. Multe da skizoj atendas realigon en bildoj.

Ĉirpanliev ĝis nun havis kvar memstarajn ekspoziciojn. En 1972 li partoprenis en la komuna bildekspozicio de la aŭtodidaktaj pentristoj en Sofio okaze de la Deko Kongreso

de la Bulgara Komunista Partio kaj havis sian memstaran ekspozicion.

Multaj bildoj de nia samideano estas ellaboritaj kun alta majstreco kaj artista sento. Rigardante ilin oni ne povas diri, kie komenciĝas kaj kie finiĝas la limo inter la profesia kaj aŭtodidakta pentroarto.

La perspektivo, kiun multe da pentristoj regas bone, en la bildoj de Ĉirpanliev estas perfekta.


Tiuj bildoj brilas de freŝaj koloroj. En ili oni sentas aeron kaj lumon. La koloroj estas puraj, la formoj konkretaj.

Nia samideano majstre pentras ankaŭ florojn.

La bildoj de Ĉirpanliev efikas eduke al la animo de la spektanto. Ili igas lin ami la belecon kaj la Patrolandon. Ni deziras al nia samideano novajn sukcesojn kaj ekspoziciojn.

Dimitr Denĉev

Ruinaĵo en Rodopi-montaro



EKZISTAS ANKAŬ TIA LINGVO

En sia rubriko „Vi demandas — ni respondas“ ĵurnalo „Golos Rodini“ (Voĉo de la Patrolando), eldonata de la Soveta Komitato de Kulturaj Ligoj kun la Sampatrujanoj en Eksterlando, aperis artikolo de G. Korotkeviĉ sub la supra titolo. La artikolo estas respondo al A. Kuĥar el Aŭstrio, kiu skribis:—

„Estimata redakcio! En disaŭdigoj de Radio Vieno mi nefoje aŭskultis, ke ekzistas lingvo Esperanto, kiun oni aplikas en internaciaj rilatoj. Kia estas tiu ĉi lingvo? Kie ĝi estas disvastigita? Ĉu oni konas ĝin en Sovetunio?“

Ĉi-sube ni donas la menciitan artikolon-respondon de G. Korotkeviĉ kun malgrandaj mallongigoj.

Antaŭ ol respondi al la demando de nia legantino, ne estas superflue en la komenco klarigi, kiom da lingvoj ekzistas hodiaŭ en la mondo. Unuavide ĉio ŝajnas tute klara: kiom da popoloj — tiom da lingvoj. Fakte ne ĉio estas tiel simpla. Ekzemple hispanoj, kubanoj, argentinanoj, urugvajanoj, ĉilianoj parolas unu saman lingvon — la hispanan, sed ili estas diversaj popoloj. La samon oni povas diri pri la germanoj, aŭstroj kaj parto de la popoloj de Svislando kaj Luksemburgo, kiuj parolas en unu sama lingvo — la germana. Estas ankaŭ tute kontraŭaj ekzemploj: ĉe iu popolo kreiĝas paralele du literaturaj lingvoj. Tiel formiĝis la lingva vivo de unu el la popoloj de Sovetunio — la mordva, ĉe kiu kreiĝis erzja-mordva kaj mokŝa-mordva literaturaj lingvoj.

Kalkuli kiom da lingvoj ekzistas en la mondo, estas malfacile ankaŭ pro tio, ke kelkiam ne eblas difini, kion prezentas la similaj, parencaj lingvoj — apartaj, meinstaraj lingvoj aŭ dialektoj, regionaj idiomoj.

Sed malgraŭ tio la sciencistoj-lingvistoj, nepretendante pri granda precizeco, kalkulis, ke nuntempe en la kvin kontinentoj de la mondo estas ĉirkaŭ 3000 lingvoj (kune kun la dialektoj entute pli ol 5000).

La fakto, ke ekzistas multaj lingvoj, delonge serioze implikis kaj implikas la komunikadon inter la popoloj de diversaj landoj, tial dum multaj jarcentoj la sciencistoj serĉas vojojn por solvi ĉi tiun problemon. Nefoje ili pensis trovi aŭ krei lingvon, kiu servus kiel unueca kaj konvena komunikilo inter ĉiuj landoj kaj popoloj.

La historio konas periodojn, kiam apartaj lingvoj kelkgrade kaj en difinitaj sferoj rolis kiel internaciaj. En mezepoka Eŭropo, ekzemple, la lingvo, per kies helpo kontaktis inter si sciencistoj kaj literatoroj el ĉiuj landoj, estis la latina. Sed poste la latina jam ne povis kontentigi ĉiujn postulojn, kiujn la tiutempo starigis al la internacia lingvo.

En la laboro de la internaciaj organizaĵoj, tiaj kiel UNO, la internaciaj kongresoj de sciencistoj, simpozioj kaj aliaj renkontiĝoj kreiĝis praktiko, kiam la rolon de internacia komunikilo komencis ludi ne unu, sed kelkaj lingvoj — rusa, angla, franca, hispana. La vivo, tamen, montras, ke konstante al ili aldoniĝas aliaj — la araba, hinda ktp. Oni rimarkas tendencon plimultiigi la nombron de la lingvoj por internacia komunikado. Samtempe, kiel pruvas la praktiko, la popolo de neniu lando estas ema senkondiĉe rekoni kiel *nuran* lingvon de internacia kultura kaj scienca komunikado kiun ajn nacian lingvon de alia lando malgraŭ sia estimo al ĝi. Tial la praktiko uzi kelkajn lingvojn kiel internaciajn daŭras, sed ĝi ne solvis la problemon de unueca internacia lingvo, taŭga por larĝaj sociaj, kulturaj kaj sciencaj ligoj inter la popoloj. La serĉado de vojoj por solvo de tiu ĉi problemo daŭras.

En la proceso de serĉado kaj esplorado la sciencistoj de multaj landoj venis al la konkludo, ke unu el la plej raciaj vojoj solvi tiun ĉi problemon konsistas en tio — laŭ scienca vojo krei novan internacian lingvon surbaze de la ekzistantaj lingvoj, pere de uzado

de iliaj plej flekseblaj gramatikaj formoj kaj iliaj plej aplikataj vortoj. Sur tiu ĉi vojo estis ne malmultaj malsukcesoj kaj malreviĝoj. Montriĝis nevivkapablaj la projektoj de pazigrafio — universala skribo. Malgraŭ iuj siaj bonaj ecoj montriĝis maltaŭga por praktika internacia aplikado la lingvo Volapük, kies nomo fariĝis sinonimo de io nekomprenebla. La historio de la malfacila serĉado de l'sciencistoj konas pli ol 300 projektojn de internacia lingvo. Kaj tamen unu el ili montriĝis plej sukcesa kaj vivkapabla.

En 1887 j. en Varsovio aperis ruslingva broŝuro, kiu priskribis la fundamentojn de nova internacia helplingvo. Ĝia aŭtoro estis la varsovia kuracisto L. L. Zamenhof. Vera humanisto, batalanto por paco inter la popoloj, Zamenhof forte esperis, ke la artefarita internacia lingvo, kies fundamentojn li donis, servos en la batalo por paco inter la popoloj kaj progreso de la homaro. Tial li aperigis broŝuron sub la pseŭdonimo „Esperanto“ (de ĉi tie ankaŭ la nomo de la lingvo).

... Inter la sciencistoj ĝis nun ne estas egala opinio pri la artefarita internacia lingvo. Iuj rilatas al ĝi tute negative, proponante aliajn vojojn por solvo de la problemo (ekzemple maŝintradukado aŭ simpligi iun el la naciaj lingvoj kaj proklami ĝin komuna internacia lingvo ktp.). Aliaj (ekz. akademianoj A. Berg, A. Ariste k. a.) opinias utila kaj celkonforma la uzadon de artefarita lingvo en la internaciaj rilatoj.

Sed tiel aŭ aliel dum 85 jaroj da ekzistado la lingvo Esperanto akiris disvastiĝon en la mondo. Ĝi estas uzata en internaciaj kulturaj kaj sciencaj rilatoj, en individua kaj kolektiva korespondado de homoj el diversaj landoj, en la turismo, radiodisaŭdigoj kaj en la multaj aliaj sferoj de la internacia komunikado. En Esperanton estas tradukitaj multaj elstaraj verkoj de la monda literaturo kaj

verkoj de sciencistoj el diversaj landoj

La plej granda internacia organizaĵo de la esperantistoj estas UEA — Universala Esperanto-Asocio. En ĝi membas kelkaj internaciaj unuiĝoj de amikoj de l'internacia lingvo. Inter ili — ankaŭ la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Ĝia tuta agado pasas sub la slogano „Per Esperanto por mondopaco“. MEM partoprenas la agadon de la Tutmonda Packonsilantaro.

En diversaj urboj de Sovetunio funkcias kursoj de Esperanto kaj kluboj de esperantistoj ĉe kulturdomoj kaj domoj de sciencistoj. Ili korespondas kaj subtenas kontaktojn kun esperantistoj el multaj landoj de la mondo. Ĉe la Unuiĝo de Sovetaj Societoj por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando funkcias Komisiono de Kunordigo de l'Internaciaj Ligoj de la Sovetaj Esperantistoj. En USSR multfoje estas eldonitaj lernolibroj kaj vortaroj de Esperanto, aperis nemulta literaturo en tiu lingvo — verkoj de V. I. Lenin, de rusaj klasikuloj kaj klasikuloj de literaturoj de aliaj sovetaj popoloj, verkoj de sovetaj beletristoj kaj poetoj, libroj pri Sovetunio.

La sovetaj esperantistoj kaj la esperantistoj el la aliaj socialismaj landoj partoprenas internaciajn kongresojn kaj renkontiĝojn de esperantistoj, kiuj okazas ĉiujare, kaj intime kunlaboras inter si. Ili aplikas la internacian lingvon Esperanto por vaste kaj vere prilumi en la tuta mondo la vivon en siaj landoj, ties sukcesojn kaj atingojn en ĉiuj regionoj.

Oni devas havi antaŭvide, ke la posedo de la lingvo Esperanto kaj ĝia uzado en la internaciaj rilatoj tute ne kontraŭstaras la neceson, ke la homoj en diversaj landoj lernu fremdajn lingvojn. Tute kontraŭe: la posedo de Esperanto faciligas la lernadon de fremdaj lingvoj fare de ĉiu homo, ĉar ĝi kreas bonan bazon por tio.

G. KOROTKEVIČ

En la ĉiutaga centra ĵurnalo „Veĉerni novini“ de 2. I. 1973 aperis artikolo de la ĵurnalisto Mihail Topalov, titolita „Batalanto kun paletro“, kiu tuŝas kelkajn interesajn momentojn el la vivo de nia granda nuntempa pentristo Stojan Venev. La artikolo estas akompanita de ties karikaturisto Tenjo Pindarev.

Unu el la plej interesaj por ni informoj en la artikolo estas tiu, ke en sia juneco ankaŭ Venev lernis Esperanton kaj inter siaj pseŭdonimoj (ĉirkaŭ 10!) uzis ankaŭ Esperantajn. Jen fragmento el la dialogo inter la ĵurnalisto Topalov kaj la pentristo:

— „Baj¹ Stojan, foje vi menciis pri iu pseŭdonimo de via edzino — „Ĥristka Pro“. Ĉu vere ŝi pentris karikaturojn? . . .

— Tute ne. Mi pentris ilin. La polico min persekutis kaj arestis pro ĉiu karikaturo. Kaj mi estis devigata subskribi mian edzinon. Tio ne estas mia nura pseŭdonimo.

— Kiom da aliaj vi havas?

— Ĉirkaŭ deko. . .

— Kiu estis la unua?

— Proletarĉe².

— Post ĝi?

— Post ĝi venis „Bateto“³, kaj iom poste mi komencis subskribi min per „Ruĝa Lampiro“.

— Kion signifas ĝi?

— En bulgara lingvo — „Ĉervena Svetulka“. Tiam, en la tempo de „Ĉerven Smjah“, ni lernis Esperanton. Kaj mi komencis uzi miajn Esperanto-konojn por fari el ili pseŭdonimojn. Mi forĝis tiun ĉi — „Ruĝa Lampiro“. Poste venis „Ĥristka Pro“ kaj aliaj.

— Kaj ĉu vi havis la plezuron viziti iun kvartalan policejon?

— Ho, jes. . .

— En kiu kvartalo!

— Ne estis kvartalo. Oni venigis min rekte en la Direkcion de la Polico. . .

Kaj plue la amata pentristo rakontas pri siaj „plezuroj“ kiel multfoja gasto de la policianoj en la tempo de kapitalismo kaj monarkismo en nia lando.

¹ Baj — adresvorto de estimo al plenaĝa viro.

² „Proletarĉe“ = Proletido.

³ „Bateto“ de „bate“ — adresvorto al pli aĝa frato.

⁴ „Ĉerven Smjah“ (Ruĝa Rido) — semajna humoraĵa revuo, aperinta en Sofio kiel organo de Bulgara Komunista Partio (1919—1923).

BULGARA ESPERANTISTA KOOPERATIVO

str. „Neofit Rilski“ 18, Sofio

liveras:

ESPERANTO-BULGARA KONVERSACILIBRO

Tradukinto Ivan Sarafov, redaktoro Asen Gri. gorov, 2-a eldono, 147 paĝoj, prezo 0,35 levoj Poŝformata helpilo, necesa por ĉiu, kiu volas perfektigi en Esperanto.

9 ILUSTRITAJ KOLORAJ POŝTKARTOJ

kun tekstoj en bulgara lingvo kaj Esperanto pri bulgaraj folkloraj kostumoj, monto Vitoŝa kaj la urboj Sofio, Plovdiv, Smoljan. Prezo de unu karto 0,10 lv.

Tiujn kaj aliajn esperantaĵojn vi povas aĉeti en la 12 vendejoj de Bulgara Esperantista Kooperativo en Sofio.

Vizitu nian reprezentan magazenon je str. „Car Ŝiŝman“ 4 (apud la granda hotelo „Sofia“).

Promenigu per ilustritaj poŝtkartoj viajn eksterlandajn amikojn tra Bulgario!

KIU ESTAS HEROO?

Li estas forta —
li ŝatas interbatiĝi.
Li eĉ kuraĝas alproksimiĝi al pliaĝuloj.

Ĉu li estas heroo?
Li havas oratoran talenton.
Al ĉiu li raportas pri siaj agoj.
Sed ne demandu min pri ties vero!
Ĉu li estas heroo?
Li estas strebemulo:
Ĉie li estas la plej bona.
Sed li konservas ĉe si ĉiun scion kaj povon.

Ĉu li estas heroo?
Li ne estas la plej forta.
Sed al ĉiu li helpas, tiel bone kiel
li kapablas.
Li ne havas oratoran talenton.
Sed liaj agoj por si mem parolas.
Li ne estas strebemulo.
Tamen li diligente lernas utile al
si kaj sia socio.
Lin mi nomas heroo.

*K. Munde, 14-jara lernanto
El „Junularo“ — magazino el GDR, 1973*

URSO KAJ MALJUNULINO

Ordinare la urso rilatas al la homo
respekte kaj malofte atakas lin.

Foje en la siberia tajgao okazis ne-
ordinara evento.

Iu maljunulino iradis ĝuste al siaj
konatoj. Apogante sin sur bastono, ŝi
marŝis kaj rigardis nur siajn piedojn.
Longe la maljunulino iris laŭ arbora
vojeto kaj subite ektrovis sin antaŭ
vila brusto de urso. Evidente la besto
estis rimarkinta la maljunulinon
de malproksime, iris renkonte, ek-
staris sur siaj malantaŭaj piedoj kaj
atendis ŝin. Tiel maljunulino trafis la
ĉirkaŭprenon de la kurbakrura urso.

La besto flaris ŝin, ĉirkaŭrigardis ŝin
de ĉiuj flankoj, konvinkiĝis, ke ŝi ne
estas danĝera homo, iom levis kaj sta-
rigis ŝin en la saman lokon. Eksvenis
la maljunulino de timo kaj falis. La
urso denove levis ŝin, sed refoje la
maljunulino falis. La besto komprenis,
ke ŝi bezonas apogilon, tial denove le-
vis ŝin, alportis ŝin al proksima arbo
kaj starigis ŝin ĉe la trunko. Poste al-
portis ankaŭ la bastonon — unuvorte
kreis ĉiujn oportunajojn por ŝi.

Fine la maljunulino komprenis, ke
la urso ne intencas fari al ŝi malbo-
non. Tamen ŝi perdis la deziron iri al
siaj konatoj kaj revenis hejmen. La
urso ankaŭ iris sian vojon.

Ekrusigis: A. Orlov

KRUCVORTENIGMO

- | | |
|--|---|
| 1—2. La urbo, kie okazis la Kongreso de TEJO en 1963 j. | 16—17. Vira kantista voĉo (radiko). |
| 2—3. Apartenanta al la tre malnova homa historio (radiko). | 17—18. Legomo (radiko). |
| 4—5. La plej alta pinto de Kaŭkaz-montaro. | 19—20. Delikate moviĝi tien kaj reen en la aero. |
| 5—6. Spertante doloron kaj malfeliĉon kun granda firm-animeco. | 20—21. Atomoj de sama kemia elemento kun diversa pezo (radiko). |
| 7—8. Tiom, kiom estas bezone. | 22—23. Fina parto de iuj verkoj (radiko). |
| 8—9. Trastudi iun objekton (radiko). | 23—24. Rapidkura eleganta besto el familio de antilopoj. |
| 10—11. Vorto aŭ esprimo speciala pri iu scienco, arto, fako ktp. (radiko). | 25—26. Rapidkura ĉasbesto. |
| 11—12. Soldato el speciala kavaleria regimento (radiko, inverse!). | 26—27. Kurba linio, laŭ kiu moviĝas la planedoj (adverbo). |
| 13—14. Specialisto pri urinaj-seksaj malsanoj (radiko). | 28—29. Sur meteorologiaj mapoj: la linioj, kiuj kunigas lokojn kun sama aerpremdo je donita momento (radiko). |
| 14—15. Superanta la ordinarnajn dimensiojn. | 29—30. Mallonga priskribo de okazintaĵo aŭ evento (radiko). |

- 31—32. Famekonata urbo, kie la 4-an de majo 1886 okazis eventoj, honore al kiuj poste la laboristaro fiksis sian internacian feston.
- 32—33. Muzika tono malproksima de alia je ok gradoj.
- 34—35. Fini studadon en supera lernejo (radiko).
- 35—36. La urbo, kie okazis en 1968 la 37-a Kongreso de BEA.

Post la solvo de la krucvortenigmo en la horizontalaj linioj I, II, III vi ricevos bondezirojn al konata bulgara Esperanto-poeto.

Marin Băcev

70	4	7	10	13	★	19	22	25	28	31	34
	I										A
1					16					I	
									O		
								O			
							O				
2	5	8	11	14	17	20	23	26	29	32	35
II					A						
				A							
			A								
		O			18						
3	6	9	12	15	★	21	24	27	30	33	!
III	E										

TRA LA GAZETARO

En la ĉiutaga j. „Rabotniĉesko Delo“ (13. I. 1973) — artikolo de Nikola Aleksiev, prezidanto de BEA — „Aktiva kaj varia agado“ — pri la agado de la bulgaraj esperantistoj dum 1972 j.

En la ĉiutaga j. „Veĉerni Novini“ (1. II. 1973) — informo pri la solena celebrazo de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev okaze de lia 70-jariĝo.

En j. „Kom“ — Berkovica (1. II. 1973) — artikolo de Violeta K. Petrova, titolita „Antaŭ 30 jaroj. La besto estas pli kruela, kiam ĝi mortas“, dediĉita al la frakaso de la hitlerista armeo ĉe Stalingrad. La aŭtorino rakontas, ke tiutempe la policanoj konfiskis ŝian broŝuron „Esperanto kaj la komunismo“, ŝiajn korespondadojn kaj fotojn. Oni arestis ŝian patron, kaj la poliestro moke diris al li konversacii en Esperanto kun li. En la sama tempo ok ekzekutistoj kruele komencis bati lin.

En j. „Rodopski Ustrem“ — Smoljan (3. II. 1973) — artikolo de Marija Diĉeva „Jaro de elprovoj kaj sukcesoj“, en kiu la aŭtorino rakontas pri la agado de la esperantistoj en la distrikto de Smoljon konekse kun la decidoj de la 38-a Kongreso de BEA, okazinta en 1972 en tiu ĉi urbo.

En j. „Trojanski Glas“ (21. II. 1973) — artikolo de Vasil Mitovski „Esperanto — amikeco trans limoj“ — pri la Internacia Semajno de Amikeco.

En j. „Narodno Delo“ — Varna (12. II. 1973) — informo, ke oni malfermas E-kurson kun gvidanto doc. G. Dimov.

En la ĉiutaga j. „Kooperativno Selo“ — Sofio (23. II. 1973) — informo de Saŝo Vragolomov pri la eksperimenta kurso de Esperanto en v. Temelkovo, distrikto de Pernik, kun foto de la kursgvidantino Cvetana Zareva kaj la lernantinoj Aleksandrova, Sofronieva, Kirilova.

En j. „Pravna Tribuna“ — Sofio (24. II. 1973) — artikolo de Genĉo Genĉev „Defendo de la laboro en PR Bulgario“ (el la vivo de la Esperanto-Sekcio ĉe la Asocio de la Juristoj en Bulgario, ankaŭ pri la raporto de la juristo Dimov je la sama temo, farita antaŭ la UK de Esperanto en Portland, Usono).

En j. „Uĉitelsko Delo“ — Sofio (27. II. 1973) oni publikigas „fragmenton el la intervjuo kun la sekretario de la Centra Laborrondo de Esperanto ĉe la Kultura Unuiĝo de GDR Detlev Blanke, publikigita en „Freie Welt“ n-ro 50 de 2. XII. 1972.

En la sama ĵurnalo (27. II. 1973) — humora rakonteto de Nikola Nikolov, titolita „Lingva halo“.

En j. „Oteĉestven Glas“ — Plovdiv (2. III. 1973) — informo de Fani Miĥajlova pri la esperantista renkontiĝo en Karlovo konekse kun la 125-a datreveno de la naskiĝo de Ĥristo Botev kaj 100-a datreveno de la pereo de Vasil Levski.

En j. „Ĥaskovska Tribuna“ (6. III. 1973) — informo „En servo de la paco“ konekse kun la Semajno de Internacia Amikeco.

En j. „Zarja na Komunizma“ — Loveĉ (12. III. 1973) — informo de Georgi Boĉev

„Distingiĝo de la esperantistoj de Trojan“ — konekse kun la 50-datreveno de la komenciĝo de E-movado en Trojan kaj enmanigo de specialaj adresoj kaj orinsignoj al la veteranoj Minko Conkovski kaj Mirĉo Vasilev.

En j. „Trojanski Glas“ (14. III. 1973) — artikoleto de Georgi Boĉev „Veteranoj de la esperantista movado“ — pri la honorigo de la veteranoj Minko Conkovski kaj Mirĉo Vasilev fare de CK de BEA.

En la ĉiutaga j. „Oteĉestven Front“ — Sofio (20. III. 1973) — informo pri la solena kunveno de societo „Maksim Gorkij“, konekse kun la 25-a datreveno de la subskribo de Kontrakto pri Amikeco, Kunlaborado kaj Reciproka Helpo inter Bulgario kaj USSR kun prelego de doc. Ganĉo Todorov. Oni projekciis E-filmon „La Tero, kiun mi amis“.

En la ĉiutaga j. „Veĉerni Novini“, (20. III.

1973) — informo pri la sama kunveno.

En j. „Dunavska Pravda“ (19. III. 1973) — informo de T. Radeva „La esperantistoj celebras la jubileon“ — pri solena kunveno de la esperantistoj en Ruse lige kun la 25-a jubileo de la sama kontrakto.

En gazeto „Mlad Matematik“ (Juna Matematikisto), jaro IV, 1973, n-ro 1, eldonata de Bulgara Societo de Matematikistoj, distrikta fako „Popola Instruado“ kaj la Matematika Gimnazio en u. Pazarĝik — materialo de Sonja Zeĉlikova el Prago, tradukita el Esperanto de Petko Arnaudov, en kiu oni parolas pri interesa malnova muzikilo en la restoracio „Ĉe Kaliĥa“, iam ofte vizitata de la fama ĉeĥa verkisto Jaroslav Haŝek.

ĈIAM VIVA EN NIAJ KORJOJ

Antaŭ unu jaro en la printempo subite forpasis en sia 55 jara aĝo nia tre akiva s-ano

kolonelo KRÂSTJU JORGOV KRÂSTEV

el vilaĝo Dâskot, distr. de Veliko Târnovo.

Li estis enu el la unuaj, kiuj lernis Esperanton en Dâskot dum 1925 j. kaj lasis daŭrajn spurojn kiel esperantisto. Krâstev estis altkonsciencia, progresema homo. Kiel patrioto kaj kontraŭfaŝisto li aktive partoprenis la militon de nia popolo kontraŭ la hitleristoj en 1944/45 j.

En la nova popola ŝtato K. Krâstev longe laboris kiel lektoro en la Popola Militlernejo en Sofio. Ĝis sia lasta spiro li forte amis Esperanton kaj aktive propagandis ĝin ĉiam kaj ĉie.

Ni, liaj samvilaĝanoj kaj amikoj, sekvos ĉiam lian ekzemplon kaj laboros obstine por Esperanto, por amikeco kaj paco inter la popoloj

P. M. Džavolov

Bulgario

Veneta Petkova — aŭtomobila uzino „Balkan“, ceh 26, Loveĉ, (24-j. — kun ĉl pri ĉt.).

Jonko Stojanov — uzino „Balkan“, Loveĉ, (22 j. — kun ĉl pri ĉt.).

Veselin Angelov — v. Dojrenci, Loveŝko (26 j. — kun ĉl en Esperanto aŭ germana — pri ĉt, speciale pri sporto, turismo, bk., gramofondiskoj k. a.).

Veneta Topalova — str. Ĉerno More 3, Loveĉ, (22-j. — kun ĉl pri ĉt, speciale pri bk, insignoj, gramofondiskoj).

Penko Naĉev Penkov — str. Trakijska 7, Loveĉ, (24-j. — prefere kun fraŭlinoj el ĉl pri ĉt.).

Spas Nikolov — str. Vasil Levski 109, Loveĉ (25-j. fraŭlo — kun ĉl pri ĉt.).

Jordan Tolev — str. Pekin 8, 3/27, Plovdiv (27-j. konstruĝeniero kun ĉl pri arkitekturo kaj konstruado, interŝanĝas konstruliteraturon, esperantaĵojn k. a.).

Dobrinka Toleva — str. Pekin 8, 3/27 — Plovdiv (27-j. fizikisto — kun ĉl. pri fiziko kaj esperantaĵoj).

Petko Sandev — zavod „Balkan“ (instrumentalen), Loveĉ (20-j. — kun ĉl pri ĉt.).

Ĉeĥoslovakio

Komencantoj 14-60-jaraj — kun ĉl pri ĉt. Interŝanĝas bk, gram. diskojn k. a). Skribu al ilia gvidanto: František Vesely, H. Poĉaply — 183, o. Melnik.

František Vesely — H. Poĉaply — 183, o. Melnik (kursgvidanto, kolektas mar-konkojn kaj mar-krabojn, precipe grandajn el Usono, Sovetunio, Japanio, kaj rekompencas laŭdezire).

Ĉilio

Hernan Garrido Viveros — Rio Baker 8022, Las Barrancas, *Santiago* (kun bulgaroj).

GDR

Eva Nölting — 25 *Rostock 1*, Gertrudenstr. 1—2 (21-j. — kun sofianoj, ŝatas muzikon, vojaĝojn).

Italio

Pli ol 300 gelernantoj de Esperanto dez korespondi kun bulgaraj lernantoj. Skribu al ilia instruistino: S-ino Franca Taddei, Via Fano, 47 023 *Casena*.

Kubo

Rafael Puente — Calle 41 № 8 2y4 Vedado zp. 4, *Habana* (24-j. fraŭlo, laboristo en leda industrio — kun gebulgaroj, ŝatas muzikon, pm, revuojn).

Pollando

Alina Madziewicz — O2 — 692 *Warszawa* ul. Jadzwingóm 5/7 m 78 (18-j. — pri muziko, filmoj, libroj k. a.).

Halina Bialkowska — 19—400 *Olecko*, ul. Lynarama 4/29, woj. Bialystok (22-j. — kun gebulgaroj pri turismo, sporto, literaturo).

Edmund Glebocki — ul. Kopernika 29, 12—160, *Wielbark* pow. Sicztyno (kun ĉl).

Novaj geesperantistoj (20—35-jaraj) dez. korespondi kun gebulgaroj.

Skribu al komuna adreso: Wiesław Beyrowski — p. k. 37, 84—300 *Lebork*.

Elzbieta Sulima — 19-300 *Eik*, ul. Polna 20/41 (25-jara — kun ĉl pri literaturo, moderna muziko, kino, teatro, bk, pm, diapozitivoj, modernaj revuoj, gram. diskoj k. a.).

Maria Czarniak — 34—146 *Stryśzów* 95, pow. Wadowice, woj. Krakow.

Kosz Elzbieta — 54-616 *Wrocław-26*, ul. Kohna 3, (24-j. — kun ĉl pri literaturo, turismo, filmoj, junulara vivo, bk, pm, suveniroj k. s.)

Polina Szubarczyk — *Szczecin*, Al. Wyzwolenia 3/7 (15-j. lernantino — kun ĉl pri literaturo, filmoj, muziko, turismo, bk).

Anna Ziepa — *Prudnik*, ul. Batorego 4 m. 5 (18-j. lernantino — kun ĉl pri literaturo, turismo, bk, gram. diskoj, diapozitivoj, modernaj revuoj k. a.).

Maria Nowosielska — Laski 2, pow. *Jasło*, woj. Rzeszów, 38.200 (21-j. lernantino en medicina lernejo — kun ĉl pri literaturo, distra kaj leĝera muziko k. a.).

Izabella Romanna Illakovicz — ul. Katowicka 42/2, 52-022 *Wrocław* (26-j. — kun ĉl pri vojaĝoj, filmoj, muziko, literaturo, bk, pm, pupoj en popolaj kostumoj, gram. diskoj).


Zofia Majewska — *Zuduriska Wola*, ul. Sieradzka 40 m 1, woj. Łódź (23-j. — pr. literaturo, teatro, filmoj, turismo, revuoj, gram. diskoj, bk).

Sovetunio

Multaj diversaĝaj aktivuloj el la plej konataj E-klubo de Sovetunio serĉas korespondantojn. Temoj kaj interŝanĝoj laŭ interkonsento. Komuna adreso: Sovetunio, SU-450 025 *Ufa*, abonkesto 162, Esperanto-klubo.

20 lernantoj dez. korespondi kun ĉl pri pm, bk, moneroj k. s. Komuna adreso: Kālev Katus — Kauba 40-10, *Tallinn* — 200 013, Estonio.

Aniŝenko Jurij Miĥajloviĉ — str. V. Ivanova 15, kv. 44, 644048 *Omsk* — 48 (32-j. ŝoforo — kun ĉl precipe pri ĉasado, ŝako kaj turismo).



Esperanto-Klubo el 18—25-jaraj membroj dez. korespondi tutmonde pri ĉt. Komuna adreso: Boris Anohin — *Ust. Kamenogorsk* — 18, a. k. 13, Esperanto-klubo „Verda Horizonto“.

Anatolio Dovĥiš — 245 110 *Ŝostka*, Sum-skaja oblastj, Glavpoĉtamt, do vostonovaniya, Ukrainio (gvidanto de E-Klubo — kun ĉl pri ĉt, kolektas ekslibrisojn).

Ĉistjakova Nadja (*sur la foto*) — str. Engelsa 48, ĉ. 91, *Ivanovo* (23-j. studentino en Teksa Instituto — kun ĉl pri ĉt).

Endel Pajula — 202 830 *Ambla*, Paide raj. Estonio (28-j. — kun ĉl; kolektas librojn, gazetojn, insiginojn, bk).

Karev Viktor — prosp. Mira 32, kv. 137 Omsk 50 (20-j. studento en Pedagogia Instituto — kun esperantistoj el Bulgario, Francio, GDR k. a. pri turismo, geografio, muziko-pm, bk). Respondo certa.

Heino Metsamärt, Kunderi 7, 202 900 Viljandi, Estonio (33-j. teknikisto — kun ĉl, pri vojaĝoj, filmoj, geografio, insignoj, bk k. a.).

Paulikaite Stasė — *Taikos g-vė* № 3, Kretingos rajonas, Litovio (23-j. kuracista helpanto — kun ĉl; kolektas bk, gram. diskajn).

Vivian Kärner — Sütiste 3-130, Tallinn 200029, Estonio (26-jara).

17—20-jaraj gejunuloj, kiuj interesiĝas pri sporto kaj moderna muziko, dez. kor. kun ĉl; interŝanĝas bk, pm. Komuna adreso: *Raseiniai* 231400, Kulturos Namai Esperanto-klubus, Litovio.

20 novaj geesperantistoj inter 23—24 jaroj dez. kor. kun ĉl pri ĉt. Skribu al ilia instruistino: Smetanina Svetlana, str. Timirjazeva, 23—410, Ivanovo 153 393. Respondo certa.

Andrus Ruhno — *Parnu* mnt. 6, Marjamaa 203 521, Estonio (16-j. lernanto — kun junaj gebulgaroj pri sporto, muziko, tekniko, olimpiaj ludoj, pm).

Egorova Elena — *Novomičurinsk* 391 098, Rjazanskaja oblastj, Gres, domo 24, kv. 69 (17-j. studentino — pri muziko, bk, gram. diskaj k. a.).

16 junaj esperantistoj deziras havi amikan korespondadon kun samaĝuloj tutmonde. Komuna adreso: Esperanto-klaso, 10 Keskkool, Tallinn, 16, Estonio.

32 novaj esperantistoj serĉas korespondantojn el la tuta mondo. Komuna adreso: Instruistino Helju Viires, 32. Keskkool, Mooni 100, 200 029 Tallinn, Estonio.

Esperanto-grupo en estona urbo Haapsalu deziras korespondi. Skribu al: Instruistino Leeni Vahuri, 203 160 Teabla, Uus 22, Estonio.

Viktors Laškovs — *Cesis*, str. Lebedeva 28—18, Latvio (bibliotekisto — kun ĉl, interŝanĝas pm, monerojn, monbiletojn, k. a.).

Levontin Anatolo — *Harkov* 3, placo Teveleva 2/2, kv. 101 (24-j. inĝeniero — kun ĉl per bk.).

Ŝkirko Nataša — *Harkov* 120, 605 mikro-rajon 60, kv. 7, (19-j. studentino — kun ĉl per bk).

Ŝiršova Roza — *Harkov* 50, placo Fejersbaĥa 6, kv. 4 (45-j. inĝenierino — kun ĉl per bk).

Artemenko Garri — *Harkov* 121, 606 mikro-rajon 1, kv. 9 (33-j. inĝeniero — kun ĉl per bk.).

Goltelova Nataša — *Harkov* 38, 1-a po-pereĉnaja 5, kv. 3 (17-j. lernantino — kun ĉl per bk).

Kersti Kalmet — *Järvakandi Tehased*, M. Gorki pst. 29. Estonio (26-j. fraŭlino — pri ĉt kun Kubo, Rumanio, ĈSR, afrikaj landoj; pm, bk).

Medvedev L. V. — ul. Borodinskaja 7, stancia Nemčinovka, Moskva (25-j. aspiranto de geokemio kaj geografio ĉe Moskva universitato — kun fakuloj el ĉl).

Kuzmenko Nikolao — 310 136 Harkov — 136, 531 mikro-rajon, domo 128, kv. 39 (studento).

Dovidavičiute R. — str. Ario-gološ 23, 235 036 Josvainiai, Litovio (23-j. fraŭlino — kun ĉl pri junulara vivo).

Albinas Kirvela — 232 043 Vilnius, Arĥitektu 6—21, Litovio (43-j. inĝeniero — kun ĉl pri ĉt; kolektas proverbojn, aforismojn, bk, pm, librojn).

Jukoŝevičius Justinas — 234 276 Vilkaviškio raj., Alksnikes pšt., Patilčius kol., Litovio (16-j. — kun ĉl pri lingvoj, muziko, bk, pm).

Arvelt Kaasma — *Kehra*, Koidula 19, Estonio 202 240 (40-j. seruristo de mezuriloj — kun ĉl pri ĉt).

Fred Neeme — *Kehra*, Kooli 9—26, Estonio 202 240 (46-j. inĝeniero — kun ĉl pri ĉt, pm, bk).

Halitova Zoja — 453 210, Išimbaj 4, ul. Sovetskaja 55—3 (21-j. oficistino).

Aleksandravičiute Nijola — Vilnius 6, Vytenio 47—30, Litovio (22-j. fraŭlino — kun ĉl pri arto, vojaĝoj k. a.).

Liliana Merkute — ul. Basanavičiaus 7—10, Panevezys, Litovio (lernantino — kun 14—16 jaraj esperantistoj).

Žedulis Česlovas — *Šiauliai Talšos* 7, Litovio (25-j. inĝeniero — kun ĉl pri ĉt, kolektas pm, bk, insignojn, sondiskojn k. a.).

Mazinuškin Igor — Vilnius, Perkuno 10—38, Litovio (kun ĉl pri ĉt).

Suško Aleksandro — str. Taikos pr., 10—49, Klaipėda, Litovio (kun ĉl pri ĉt).

Smikiene Maria — 235 030 Kedainai, p/k 59, Litovio (mezaĝa inĝenierino — kun ĉl pri ĉt).

Galvydis Jonas — Juod-kiški 10, 235 030, Kedainai, Litovio (mezaĝa elektristo — kun ĉl pri ĉt).

Gorelikova Nataša — Ivanovo, str. Veligskaja d. 59, kv. 104 (22-j. studentino de medicino).

Gračova Olga — Ivanovo, str. 6 Koljanovskaja d. 18, kv. 2 (18-j. studentino de medicino).

Plahina Tatjana — Ivanovo, str. 1 Ruĉejnaja 43 (studentino de medicino).

GRAVA RIMARKO: Pro presado de lernolibroj por la lernejoj n-ro 4-5 ege malfruis. Ni petas la perdonon de la legantoj!

En la presejo estas faritaj ankaŭ du malagrablaj eraroj: sur p. 29 la kliŝo estas turnita; sur p. 32 super la adresoj ne eŝas legebla la konstanta kliŝo „Deziras korespondi“. Pardonon!